6-a Jaro. N-o 277 APERAS SEMAJNE Leipzig, 23./1. 1930



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerhner

IMPRESOJ EL MEKSIKIO

Elirinte el Meksikio en la jaro 1911 post la komenco de l' revolucio, kiu dum tiu sama jaro faligis la diktatorecon de Porfirio Diaz kaj elpelis la diktatoron mem por ĉiam, kaj sciante, ke dum la lastaj dekok jaroj tiu lando estis en preskaŭ daŭra civitana milito, mi tre deziris ĝin vidi proprokule por scii, ĉu aŭ ne la popolo akiris reale ion valoran, ion havindan el tiu longa batalado. Tiucele mi forlasis mian loĝ-lokon en Usono, kaj je la lastaj tagoj de oktobro 1929 mi atingis la landlimon, kie oni povas pli bone sperti iome la malfacilojn kreitajn de du registaroj.

Ĉar mi estas laborulo, la usonaj oficistoj diris, ke ili neniel povas helpi min transpasi la landlimon. Dum tiu sama monato ili forpelis centojn da aliaj laboristoj kaj devigis ilin eniri Meksikion. Tiuj ĉi lastaj naskiĝis en Meksikio. Almenaŭ oni pensas tiel, dum mi eĉ ne povas *pruvi*, ke mi *iam* naskiĝis. Oni haltigas kaj pelas laboristojn same kiel brutaron. Fine mi post multaj klarigoj, fotado, elspezoj, sanekzameno, inokulado ktp. transpasis la landlimon per meksika pasporto. La lasta ago estas la ekzameno al pakaĵoj. En tiucela ĉambro la meksikaj laboristoj havas sisteman metodon por prirabi pasaĝerojn. De mi ili nur prenis unu meksikan dolaron (peson). Ili faras tiujn fiagojn sub la nazoj de meksikaj oficistoj. Mi mencias tion nur por ke vi povu formi ideon al vi pri la registaro mem. Bone aŭ nebone pasinte la landlimon mi iris per fervoja vagonaro rekte al *Meksiko,* la ĉefurbo de la respubliko, kie mi nun restas. Mi trovigis ĉi tie lastan fojon en la jaro 1902.

Komparo kun antaŭ-revolucia epoko

Kiujn diferencojn mi rimarkas en la vivmaniero de la laborista klaso? Mi konstatas diferencojn, sed ili ne estas tre gravaj. Estas vere, ke, por paroli ĝenerale, la laboristoj estas pli bone vestitaj. Anstataŭ uzi la antikvan aztekstilan blankan pantalonon, aŭ nenian, ili nun pli ĝenerale uzas la uson-stilan bluan pantalonon, kiam ili laboras aŭ serĉas laboron. Ili ankaŭ uzas kitelon kaj ĉapon pli ĝenerale ol antaŭe. Krome ili portas malpli da sandaloj kaj pli da ŝuoj. Sed samtempe oni povas vidi nudpiedajn gelaboristojn marŝantaj sur la malvarmaj, ŝtonaj stratoj de tiu ĉi altlokita urbo, kie, dum iu ajn tago klara, oni povas vidi la neĝon sur la altaj montoj.



"Placo de la Konstitucio", plej granda placo en Meksiko.

Eble estas iom malpli da religiaj fanatikuloj inter la popolo, sed ankoraŭ estas sufiĉe da personoj, kiuj vizitas la preĝejojn, kvankam la konstruoj mem tre bezonas riparadon. Antaŭ la preĝejoj kaj aliloke vagas, sidas aŭ kuŝas multaj profesiaj gealmozpetantoj. Pro mia okupo mi konas la domojn de la popolo interne iomete. La laboristaro ne povas vivi bone pro malriĉo, kaj multokaze la aliaj klasoj vivas nebone pro nescio. Granda elcento de la loĝantaro loĝas en ludomegoj, kie ĉiu familio okupas sian tielnomatan apartamenton. Mi konas unu el tiuj domoj, kiu enhavas 140 familiojn. La posedanto estas riĉa cigaredkompanio, kiu ankaŭ posedas kelkajn aliajn domegojn. Ili fariĝis riĉaj per la nesciado kaj malbonaj kutimoj de la popolo.

Unu el la trinkaĵoj de tiu ĉi regiono estas la "pulko" (hispane: *pulque*). Ĝi estas natura suko el planto, kaj oni devas trinki ĝin dum la sama tago, en kiu oni eltiras ĝin. Ĝi estas ebriiga likvoro samgrada, pli malpli, kiel biero, sed je la dua aŭ tria tago ĝi estas multe pli ebriiga. Tro uzi la pulkon estas por gelaboruloj malvirto samkiel tro uzi multajn aliajn aĵojn. Lastatempe la leĝoj kaj reguloj tie ĉi iom nefavoras la vendadon de pulko. Kial? Pro tio ke la urba kapitalistaro povas pli bone ekspluati per biero ol per pulko. Nun oni parolas pri la plena neniigo al ĉiuj likvoroj same kiel en Usono (??).

La politikaj bataloj

La politika afero ĉi tie estas abomena miksaĵo. Estas du ĉefaj partioj. el kiu unu tenas la regpovon kaj alia volas havi ĝin. Nek unu nek la alia havas iajn principojn. Ili nur volas vivi kaj regi kaj, por fari tion, kompreneble ili devas trompi la laboristaron konstante. La eksterrega partio nomiĝas Kontraŭ-reelekta Partio, ĉar oni uzis tiun nomon dum la revolucio en jaroj 1910/11 post la pli ol 30-jara regado de Diaz. La reganta partio nomiĝas Nacia Revolucia Partio. Ĝi havas grandajn afiŝojn, sur kiuj oni vidas du virojn el la laborista klaso. Unu estas kamparano, kiu tenas en la mano sian rikoltilon. La alia estas urba laboristo kun sia martelo. Evidente ili esperas kapti kelkajn balotvoĉojn el la komunista tendaro. La 17-a de novembro estis la tago de la nacia baloto. Unu semajnon antaŭe la nereganta partio havis surstratan manifestacion kaj atakis la ĉefoficejon de la alia partio detruante la tutan enhavon kaj parte la domon mem. La reganta partio, bone sciante, ke gramo da povo pli valoras ol tuno da bruo, ne ekscitiĝis. Ĝi nur metis sur la duone detruitan domon afiŝon, anoncante, ke tio ĉi estas la laboro de la alia partio kaj montras ĝian kulturon. La tago de la elektoj pasis tre kviete laŭ la ĵurnaloj. Da mortigitoj estis nur ok, en tiu ĉi urbo, kaj da vunditoj nur deknaŭ. La reganta partio venkis facile, sed la alia partio portis prielektan demandon al la Nacia Parlamento. Post iom da tempo tiu ĉi tre solene decidis, ke la kandidato de la reganta partio reale venkis kaj ke li estos la nova prezidanto de la respubliko. Ĉio ĉi estas nur politika farso por "ĵeti sablon" en la okulojn de la popolo. La tagon, kiu sekvis la decidon de la parlamento, la estonta prezidanto de tiu ĉi libera respubliko komencis vojaĝon al Usono. kie loĝas la veraj regantoj de Nord-Ameriko. Unue li iris al Vaŝingtono kaj poste al Novjorko. Kial? Niaj legantoj tre bone scias tion, sed bedaŭrinde milionoj da gelaboristoj ankoraŭ havas la ideon, ke la laboristaro povos liberiĝi el la kapitalista regpovo per politika agado. Estas vana iluzio.

Vivnivelo. Vivkondiĉoj

En la jaro 1902 estis miloj da ĉevaloj sur la stratoj de tiu ĉi urbo. Nun tre malmultaj. Tiam la fiakroj estis el tri koloroj kaj tri klasoj; la prezoj pohoraj estis 50, 75 aŭ 100 centavoj (100 cent. = 1 peso). Anstataŭ ili nun ekzistas publikaj aŭtomobiloj unuklasaj, kiuj kostas dol. 1.50 pohore. Pro tiu multkosteco laboristoj preskaŭ ne uzas ilin. La strat-trafiko ĉi tie estas furioza kaj la aŭtomobiloj multnombraj. Iun vesperon mi kalkulis la aŭtomobilojn, kiuj preterpasis ĉe unu flanko de monumento dum dek minutoj, kaj ili estis 202. Mi opinias, ke simila nombro pasis alidirekten ĉe la alia flanko dum la samaj dek minutoj. La aŭtomobilaj vendejoj ĉi tie estas same luksaj kiel en Usono.

La vivkostoj estas tre altaj en tiu ĉi urbo, eĉ kompare kun la prezoj en Usono. La impostoj estas grandegaj. La reganta klaso regas same kiel alilande per siaj registaro, armeo, gazetaro, religioj ktp. La laboristaro ankoraŭ havas antaŭ si la samajn problemojn, kiujn ĝi havis antaŭ la revolucio, t. e. rompi kaj preni el la manoj de la reganta klaso parazita la regpovon kaj teni ĝin por si mem. Oni ne povas fari tion en tiu ĉi lando per politika agado aŭ per milito. La ondego de la plej moderna, plej potenca kapitalismo imperialisma venas el la nordo kaj kovras la landon. Nenio haltigos ĝin. Por superregi ĝin kaj savi ĝiajn bonojn por la homaro, estas necese, ke la *tutmonda laboristaro* organiziĝu por tiu celo sur la ekonomia kampo. En tiu laboro la gelaboruloj de Meksikio helpos. Ili nun komencas. Ni fidu kaj laboru ĉiu ĉe sia loko. Eduku. Organizu. *1781, Meksiko.*

Pri la disdivido de grundo en Latvio

En n-o 272 aperis sub titolo "Popola voĉdonado en Latvio" artikolo de K-do 13 507 verkita en tre tendenca formo. Iniciatita popola voĉdonado ne plu okazos, ĉar la parlamento jam leĝigis la proponitan leĝprojekton. Militkripluloj de naciliberiga kaj tutmonda milito (ekzistas almenaŭ duobla nombro da loĝantoj, ol en najbaraj ŝtatetoj Estonio kaj Litovio) estas dividitaj je 5 grupoj, kiuj ricevas monatan monsubvencion ne de 13 latoj (ĉ. 2.60 dolaroj), sed de 13—90 (la plej malaltranga ŝtatoficisto ricevas monatan salajron de 84 latoj). Same la rajtoj je terricevo estas kvingrupaj, el kiuj la unuajn du posedas eksmilitistoj *efektive* partoprenintaj en bataloj. Ankaŭ grundo estas transdonita ne nur al kamparanoj: K-do 13 507 ja mem rakontas, ke "leonan" parton ricevis burĝoj kaj kapitalistoj — kio estis efektivigebla pro tio ke la registaro antaŭ "granda terdividado" eldonis regulon malpermesantan fordoni grundon al personoj ne havantaj necesan il-, gren- kaj brutaron, sen rajtoj atendi (? Red.) aŭ forvendi ĝin. Memkompreneble ne ĉiu militisto havis brutaron (insektaron, jes!...) ktp.; ne ĉiu havis helpemajn parencojn tiurilate; multaj prezentis falsajn atestojn, sed multaj restis sen io kaj post kelkaj jaroj, kiam estis nuligitaj ĉiuj ĉi malhelpoj, ili organiziĝis en asocioj kaj postulis de la registaro kaj parlamento teron aŭ monsubvencion, laŭ promesoj. Sed iliaj postuloj estis atentataj de neniu antaŭ ilia unuiĝo en tutlandan asocion, kiu aranĝis imponan manifestacion en la ĉefurbo Riga. Ĝin partoprenas ĉiuj eksmilitistaj asocioj, tiel faŝistaj kiel maldekstraj. La registaro kaj parlamento estis devigataj priparoli la aferon, registri ĉiun rezervan teron kaj ĉiujn nekompensitajn eksmilitistojn, je nombro de 30 mil personoj. Duono da ili ricevos grundon, kaj pri monkompenso al la aliaj jam ekdiskutis la parlamento.

Fine mi devus aldoni, ke la grundo estas disdonita ne po 1,5 hektaro, sed la areo varias ĝis proks. 30 hekt., laŭ valoro kaj loko (urbeto, bieno), plejparte inter 16—22 hekt. Kaj la nombro da militistoj estis ne ĉiam 30 mil, sed atingis 60—80 mil. Kiel dirite, ĉirkaŭe 30 mil dum lasta registro estis ankoraŭ nekompensitaj. *K. K. (SAT-ano 11 321).*



Alia kandidato por la Ligo de Nacioj

Kiel la naciismo enpenetras ĉiun anguleton de l' mondo, por tio oni bezonas citi nur la insulon de Men (Man) lokitan inter Irlando kaj Anglio. Tie fiere imaganta sin kvazaŭ nacio, la insula burĝaro bone zorgas pri la naciismo. Ĉiu 5-a de julio estas festata kiel nacia tago, kaj en tiu tago la insula laborforto ĉesas funkcii, ankaŭ ĉesas pagiĝi la salajraro al la laboristaro. Sed kompreneble bonan patrioton ne ĝenas tia bagatelo. Okaze de tiu festo la insula registaro komplete militiste uniformita aŭ, pli ĝentile, oficiste vestita laŭtlegas la insulajn leĝojn anglalingve kaj keltlingve, kiuj trapasis en pasinta jaro la insulan parlamenton. La ceremonio ĉiam okazos sur elstaranta artefarita monteto en proksimo de la insula mezo, kaj kompreneble estas bezonata la helpo de dio. Tial la tuta registaro vizitas la apudan preĝejon. La tie deĵoranta pastro partoprenas je la granda parado inter la preĝejo kaj la monteto. La kantado de la Mensk (Manx), nacia himno, finas la spektaklon. Kompreneble ankaŭ laŭ lingva vidpunkto necesas plifortigi la barilon kontraŭ la eksterlandulo. Tial la loka burĝaro klopodas vivigi ian antikvan lingvon. Kaj por ke flirtu kontraŭ la vizaĝo de la alilandulo nacia emblemo, estis desegnata speciala flago. Samtempe la nacia kulturo estas prizorgata per ĉiujare organizata festo, ĉe kiu nur insulaj talentuloj rajtas prezentiĝi. La ĉefurbo Dögles (Douglas) fiere fanfar-

EL USONA TAGLIBRO

Leĝo k ordo savitaj! Unufoje pli per mortigo laŭleĝa al laboristoj. Post mia raporto (vidu n-on 268) alia el la pafitaj strikantoj en *Marion* en Suda Karolino (Usono) mortis. Tial la policanoj povas fanfaroni pri ses mortigitoj k 20 vunditoj. Ĵus finiĝis (21. dec.) la juĝproceso kontraŭ ili k la juĝantaro civila k la juĝistoj proklamis, ke la policanoj estas senkulpuloj. Kvankam neniu el la policanoj povis montri vundeton, laŭ la decido la martiroj unue pafis k la policanoj kompreneble rajtas sin defendi.

Kontrastoj

Samsemajne kiam la ministro por alilandaj rilatoj sendis riproĉon kontraŭ la batalado de Sovetio en Manĉurio pri forŝtelata fervojo, li sendis marist-soldatojn por kvietigi ribelon en Hej-ti (Haiti, insulo en la Karibia Maro), kie usonaj imperialistoj rifuzas permesi memregadon de la tieaj popoloj.

Antaŭ nelonge ĉiu grava ŝtato solene subskribis la Kelog-kontrakton, per kiu ĉiu ŝtato kunagos kontraŭ tiu, kiu disrompos la pacon. Huver (Hoover) ŝajne forgesis tion k poste proponis, ke en la venonta milito neniu rajtas kapti ŝipon, kiu portas nutraĵon. La respondo al la propono estis: Sed ĉu ne per la Kelog-kontrakto iniciatita de Usono ni jam proskripciis militon, k laŭ tiu kontrakto ne povas esti neŭtrala lando, kiu rajtas ricevi nutron?

Megafone sonas tra la mondo la legendo pri usona prospero, pri la altaj salajroj, la multego da aŭtoj, da telefonoj, da bankuvoj. Sed la ĵurnaloj nun petegas kolekti monon por donaci al la suferantoj k malriĉuloj. La estro de la Amerika Federacio de Laboro, Grin (Green), diras, ke ekzistas nun 3 milionoj da senlaboruloj. Laŭ oficialaj statistikoj la salajroj de virinoj en tekseioj falas.

Ĉiu SAT-ano, kiu iom pensas pri la afero, konsentos, ke krimo estas socia produkto. Ĵus aperis grava verko, kiu efektive konfirmas la teoriojn de Bonger. Dum multaj jaroj la Instituto da Prijunula Enketo kolektis faktojn pri la loĝloko en Ŝikago de la krimema infano, k nun eldoniĝas "Delinquency Areas" (Kulpularaj Areoj). Nerefuteble la verko montras, ke domaĉa kvartalo bredas krimon. Antaŭe usonanoj diris, ke krimo estas afero de raso, t. e. ke la enmigrintoj el Mez-Eŭropo pafmortigis, ŝtelis ktp., k la Nordanoj ("nordics") ne krimemis. Nun, laŭ tiu verko, ne gravas la raso, sed la loĝloko, la socia medio. Unue la krimuloj estis plejparte irlandanoj k germanoj, kiam ili loĝas en la domaĉara kvartalo, ĉar ili ĵus alvenis al la "lando de la liberulo". Poste enmigris la svedo, la italo, la litovo k. a., k ili krimis laŭ sia manko de enspezo. Jen la memorinda rezulto ĵus pruvita en la fand-poto de Ŝikago.

* * *

Postnoto. Responde al K-do Saville (vidu n-on 269) mi dankas lin pro la "korekto" k la klarigo pri deveno de la "pensilvania-holandanoj". Fakte mi antaŭe sciis tion k tial uzis kun tiu vorto la adjektivon "tielnomataj". Mi ne scias, ĉu aŭ ne la alian komenton nia noviorka K-do direktas al mi. Certe "taglibro" ne pretendas esti libro, kiu enhavas la absolutan finan veron pri io. Ofte impresoj erarigas. Diversaj homoj havas diversecon en spertado. Ekzemple en "S-ulo" pĝ. 87, n-o 268. Dübreŭj diris, ke en Detrojt "la alkoholmalpermeso efikas bone: laboristoj ne drinkas, ĉar ili fakte ne povas." Certe ĉiu ano de tiu urbo laŭte ridus pri tiu diro. Mia sperto estis kontraŭa k en mallonga vizito laboristo gvidis min al 2 *tielnomataj* "blindaj porkoj" (idiomo por kontraŭleĝa alkoholtrinkejo), tre proksimaj al la ĉefa strato.

Kompreneble D. ne estas mensogulo; li parolis pri propra sperto k en tiu k aliaj aferoj en sia verko "Standards" li profunde misjuĝis laŭ la opinio de multaj usonaj laboristoj. Kion fari? Ĉu li eterne silentu? Ĉu unuaj impresoj valoras nenion? Ne, per la diro honeste farita k poste korektita, ni alproksimiĝas al la vero. En la interbatalo evidentiĝas la vero. *(488.)*

---

onas pri propra nacia muzeo (eks-malsanulejeto).

Sed ne opiniu, ke la insula burĝaro naive incitas al naciismo. Tute ne! La aŭtonomia regado de la insulo pro ioma plimalaltigo de l' enspeza imposto kompare kun tiu en Anglio, permesas al la etburĝaro vivi per pli malkaraj rimedoj ol en Anglio. Tio klarigas la naciismon. Kontraŭe la vivstato de la laboristo estas pli malalta ol en Anglio. Sed tio tute ne gravas. Ĉiam la laboristo, kiam li estas sen nutraĵoj kaj vestaĵoj, povas fiere fanfaroni, ke li havas patrolandon. Ĉi tiu embria nacio konsistas el 49 000 personoj.

Vilhelmo Cowan (10 085).

KIAM MI ESTIS EN MALLIBEREJO

Estis jam la unua horo nokte, kiam la malliberej-gardistoj enkondukis min kaj ankoraŭ 9 K-dojn en la ĉelon. Mi trarigardis mian novan loĝejon. Ĝi estis tre malgranda ĉelo kun du malgrandaj fenestretoj, kun kradoj el dikaj, feraj stangoj kaj ekstere ŝirmitaj per lado tiel, ke la sunbrilo povis apenaŭ penetri de supre. Sur pajlujoj, kuŝantaj sur la planko, dormis dek kvin K-doj. Samaj konataj vizaĝoj. Ili vekiĝis kaj rigardis al ni ridetante, tute ne surprizitaj pro nia alveno.

La gardistoj fermis la pordon malantaŭ ni. Ni senvestiĝis silente kaj kuŝiĝis sur la liberaj pajlujoj, kiuj estis kvazaŭ pretaj por ni. Mi estis tre laca kaj dormema, kaj mi tuj ekdormis. Sed baldaŭ mi vekiĝis, sentante tre malagrablajn pinĉojn de puloj, pedikoj kaj cimoj. Mi ne povis jam plue dormi, kaj ĝis la mateno mi konstante forpeladis de mi la malagrablajn fiinsektojn.

Je la sesa horo matene aŭdiĝis sonorilo. Ĉiuj leviĝis el la kuŝejoj, vestis kaj lavis sin. La lavado daŭris tre longe, ĉar ni estis 25 personoj, kaj ni havis nur unu lavpladejon. Je la 7-a horo du simplaj (nepolitikaj) mal liberuloj, portantaj malliberejajn vestojn, alportis du sitelojn kun kafo kaj nigran panon. Ĉiu ricevis pladon da nigra akvo, simila al kafo (sen sukero) kaj kvaronon da panbulo. Tiu pano devis sufiĉi por la tuta tago. Je la 12-a horo ni ricevis tagmanĝon konsistantan el terpomoj, griaĵo aŭ terpomoj kun pizoj. Je la 16-a horo ni ricevis vespermanĝon el terpomoj. Je la 19-a ni devis kuŝiĝi por dormi. Du fojojn ni havis unuhoran promendadon en la korto. Tri fojojn tage ni rajtis iri necesejon.

La tagoj pasis tre unutone. Por pasigi la tempon, iuj ludis je damludo, aliuj rakontis ŝercajn rakontojn, deklamis aŭ mallaŭte kantis ĥore. Tre ofte la pli klaskonsciaj K-doj lekciis, tiam ĉiuj atenteme aŭskultis.

La plej maldolĉaj tagoj komenciĝis, kiam neniu el ni plu havis monon nek ricevadis ankaŭ manĝaĵon el ekstere de la malliberejo. Tiam malsataj ni pasigis la tagojn, aŭ silentante aŭ kantante mallaŭte ĥore. En tiuj tagoj ni plej volonte kantis "la malsatstrikon", komenciĝantan per tiuj ĉi vortoj:

> En nia mallibereja kavo
> Kadavriĝos ni.
> Anstataŭ morti iom post iom,
> Ni mortu tuj!

La unua de aŭgusto pasis tamen tre trankvile, kvankam ni supozis, ke ĝi aliel finiĝus. Je la 12.30 h. unu K-do el nia ĉelo frapetis al la muro, por atentigi la K-dojn de la najbara ĉelo, ke ili aŭskultu. Ili respondis ankaŭ per frapetoj kontraŭ la muron, ke ili nin komprenis. Tiam unu K-do leviĝis al la kradoj kaj komencis laŭte paroli al la strato per jenaj vortoj:

"K-doj! Jam pasis 15 jaroj de l' momento, kiam eksplodis la mondmilito. Ankoraŭ odoras en la aero la

sango de la proletaj viktimoj, buĉitaj sur la militkampoj, pro la ordonoj de la imperialistaj mortigistoj. Kaj jen prepariĝas jam nova milito, nova buĉado. Sed nun — kontraŭ la ununura proleta kaj kamparanara registaro en la mondo. En la okazonta milito kontraŭ Sovetio la faŝista Polio kiel la plej proksima lando, staros sur la unua batalfronto kontraŭ la sovetia proletaro. Tiam la pola proletaro. tenonta la armilon en siaj manoj, decidos. Ne unu pafon kontraŭ niaj sov. fratoj! La armilaron en niaj manoj ni returnu al niaj ordonantoj, suĉantaj nian sangon, kaj ni detruu la faŝistan diktatorecon! For la faŝistan registaron de Pilsudski! Militon kontraŭ milito! Vivu la Pola Sovet-Respubliko!" Aŭdiĝis voĉoj el diversaj ĉeloj: "Vivu!"

Poste ĉiuj alproksimiĝis al la kradoj kaj ekkantis ĥore, laŭtege la unuan strofon de l' Internacio. Sur la strato oni aŭdis la kriojn de la policistoj, dispelantaj la scivolemajn preterirantojn kaj laboristojn. La gardistoj eniris la ĉelon, kriaĉante: "Ĉesu kanti!" Sed neniu atentis iliajn parolojn. Post la kantado eniris la malliberejestro kaj deklaris: "Hodiaŭ kaj morgaŭ pro puno vi ne ricevos promenadojn kaj monakceptojn de viaj familianoj."

Kontraŭ niaj supozoj la verdikto estis tre malsevera.

Sapyr A., Lodz (Polio).

★

El siriusa vidpunkto

La giganta stelo, studita de l' kanada astronomo Plasket (Plaskett), ampleksas du sunojn, kies unu havas diametron egalan al dudekoblo kaj la alia al dekokoblo de nia Suno. Tiu ĉi sistemo duobla havas temperaturon de 17 000 gradoj, kaj ĝi radias tritek-miloble pli da lumo ol la Suno; malgraŭ tio, pro sia eksterordinara malproksimo, ĝi aperas al ni kiel stelo preskaŭ nevidebla per la nuda okulo. Fakte ĝia distanco estas tia, ke ĝia lumo bezonas dek mil jarojn por alveni al ni. Kiam ni ĝin observas, tiu ĉi stelo aperas al ni kia ĝi estis antaŭ cent jarcentoj! La lumo forlasis la stelon multe antaŭ la epoko de l' piramidoj de Egiptio. La egipta civilizo floris kaj estingiĝis. Tiam tiu de la grekoj kaj romanoj. La mezepoko kun la invado de l' barbaroj ekvenis kaj forpasis. Dum ĉiuj tiuj jarcentoj la lumo estis survoje de la stelo al ni. Kaj malgraŭ sia grandega rapido de tricent mil kilometroj po sekundo, ĝi atingas nin nur hodiaŭ, post vojaĝo de cent jarcentoj, por rakonti al ni la staton de tiu ĉi stelo en tiu malproksima pasinto. La astro povus malaperi hodiaŭ, sen ke ni ĉesus ĝin vidi ankoraŭ dum dek mil jaroj . . .

VAGANTA JUNULO EN ARGENTINO

(Fino. Vidu n-on 275)

En Bonaero (Buenos-Aires), ni loĝis kelkajn tagojn ĉe amikoj, svisoj el regiono de Voŭ (Vaud) same kiel ni, — kaj poste en centrurba pensiono, por ne trouzi gastigemon de niaj amikoj. Mi dungiĝis kiel helpmasonisto, laboro tro laciga por mi, kaj mia K-do fumadis kaj trinkadis "mate"-n, dum mi laboris; li do profitadis el mia mono. Pro tio, mi post tri tagoj maldungiĝis . . . stultega decido, mi konfesas.

Feliĉe la pensiono ne forĵetis nin. sed loĝigis nin en lavĉambro. (Ĉar senlaboraj kaj senmonaj, ni supozas. Rim. de l' trad.) Ni marŝis ĉiutage 20 ĝis 25 km. por serĉi laboron, ĉar Bonaero certe estas pli granda je areo ol Parizo Nur komerca kvartalo prezentas "ĉielskrapajn" domegojn. Krom tiu centro, Bonaero estas malbonega kvadrata stratsistemo, kiun plenigas duetaĝaj aŭ pli malaltaj domoj, tute malsanige interpremitaj en la konstru-kvadratoj. Mankas enaj ĝardenoj, sanigaj liberspacoj, beleco.

Le Korbüzie' (Le Corbusier), fama urbkonstru-artisto, estas nun ĉi tie (oktobro 1929), parolas en kunvenegoj. Li proponas konstrutranĉi, trans tiun mallertan kvadrataĵon, pli belan, varian stratsistemon: diagonalajn stratojn, oblikvajn, kurbajn bulvardojn, altegajn domojn en la urbo mem kun belegaj ĝardenoj kaj larĝ-stratoj en interspaco. Nur "Palermo", kvartalo de riĉuloj, estas jam bela. Ni tiom kuris trans kaj tra la urbo!

En la haveno, mia K-do Ĵak ekvidas 'sian" ŝipon. Dum tri tagoj ni tien venis por manĝadi kun la kuiristoj: nutrado de *"unua klaso"*. Post tiaj manĝoj ni eliris pli dikaj! (Ĵus antaŭe ni manĝis, ĉiam malpli, ĉe "aŭtomat"-restoracioj, poste, pli senmonaj, ĉe "lecherias" [lakto-manĝejoj] tute malkaraj, kaj estis kelkfoje sukcesintaj elkuri ne pagante, malfacila rimedo, ĉar la veturado sur stratoj ne estas sufiĉe vigla en Bonaero por bone kaŝi sin rapide.)

Kamparlaboro

Kaj nun mi laboras en farmobieno. 700 km. distance de Bonaero. Mi kondukas tute novan motorplugilon, "Deering-22-36 HP."

Mi plugadas. Tri sulkojn fosas samtempe la motorplugilo. 150 km. da sulkoj mi ĉiutage fosas tiele. Je 3.30 ĝis 4-a horo matene mi ellitiĝas, piede mi marŝas 3—4 km. ĝis la plugila remizo. Mi oleumas mian trenmotoron, verŝas nafton en ĝian ujon, jungas plugilon ĉe trenmaŝino, provas funkciadon. Poste mi matenmanĝas kun la aliaj "gaŭĉos" (bov-gardistoj) kaj "peones" (tag-laboristoj) krad-rostitan viandon, *"mate"* (maldolĉan aŭ dolĉan), panon, "mate" kuiritan kiel teo, panon en "mate" trempitan.

Ni plugadas, en kampo 3 km. malproksima de l' plugilremizo, sed ankaŭ dum alvojaĝo ni fosas sulkon kaj poste plugadas kvadratan kamperon dum la tuta tago. La plugilrapideco estas 5 aŭ 6 km pohore, tio estas 15 km. da sulkoj pohore, 150 km. da sulkoj post dek-hora plugado. Taglaboro 10- ĝis 14-hora. Birdoj multkoloraj, strangaj, belaj, kriaĉantaj, sekvas ĉiun plugilon. Je tagmezo K-do anstataŭas min. Li posedas iom tro viglan ĉevalinon, sur kiu mi rajdas bone-nebone. Ŝi rifuzas moviĝi, aŭ subite forkuras. Miaj piedoj perdas la ledajn piedingojn, sed mi ne falas. Kiel? Mi ne scias.

Sur kampo, la unua bovamaso, kiun mi vidis (mi estis sola), proksimume 300 brutoj, terure kuris al mi bruegante, kiel kavaleri-regimento. Je dek paŝoj de mi tiu amaso ekhaltis, el plena rapido. Ili estis venintaj, stultuloj, por min vidi, scivoleme; tiom maloftaj estas la vidindaĵoj en granda kamparo. Mi marŝis pluen. Subite ĉiuj bovoj ekturniĝis, kruele interpuŝiĝante, kaj ĵetis sin galopante horizonten.

Mi ne estus kredinta, ke bovoj tiom rapide povas kuri.

Higienaj kondiĉoj

Vaguloj estas multaj en Argentino. Jam de 8 tagoj iu vagulo loĝas kun ni, manĝas ĉe ni, ne laborante. Iafoje, kiel ni, li lavas sin, krom tio li nur manĝas, dormas. La dimanĉon ni razas nin kaj enuon trenas anstataŭ plugilon.

Estas mi la vidindaĵo ĉi tie nun, ĉar mi ne parolas hispanan lingvon, ĉar mi legas, skribas, lavas min ĉiutage kiom eble, ŝanĝas iafoje ĉemizon, kuŝas en elasta lito, posedas vekhorloĝon kaj grandan pakaĵkofron. Eble mi preferus vivi en Pariza Akademio kaj ŝajni azeno, ol aperi ĉi tie kiel civilizulo. Tiu vivo min tedas, malplaĉas, sed . . . mi estas feliĉa. Ĉi komprenu aŭ ne komprenu, ne gravas.

Por manĝi ni tenas viandon per la fingroj. Ĉiu akrigas sian tranĉilon sub sia ŝuplando, aŭ sur remizogrundo, kien ĉiuj abunde kraĉaĉas. Sako

Prof. D-ro FERD. SZERENYI
MALGRANDA TERBIBLIO
La plej grandformata eldonaĵo de SAT, presita sur luksa, glata papero, plurkolora; la kartoj klaraj, konvinkaj; la teksto originala, pensiga. Bela studilo por niaj Gek-doj!
Form.: 26×36 cm. Prezo: 1.80 mk. g.
Havebla ĉe la Administracio de SAT, Colmstrasse 1. Leipzig-O-27 (Germ.)

pendas je hoko: oni viŝas per tiu sako telerojn, "mate"ojn (do kukurbojn, el kiuj oni trinkas. Trad.), tranĉilojn. En alia sako, pano sekiĝas. Viando jam de 8 tagoj pendas je alia hoko. Nubo da muŝoj sur la viando, kaj ĉie. Ĉiuj marŝas piedvestitaj per tolŝuoj, kvankam serpentoj kaj venenaj arane-egoj danĝere plenigas la landon.

Uniforma multkoloreco

En urboj, argentinaj oficialuloj prezentiĝas kiel vera marionetaro multkoloraj kiel argentinaj birdoj, sed malpli belaj kaj malpli ĉarmaj. Plej diverse vestitaj policanoj kun pintkaskoj, — fajrobrigadoj, oficiroj, soldatoj, oficistaroj, kun bulkvastoj, koloraj randoj, bantoj, strioj, kaj apude batalkamp-uniformoj "kaki"-koloraj (verdflav-koloraj). Ĉie multaj moŝt-stultaĵoj: pordistoj malbonaj, servistoj, aŭtokondukistoj pli broditaj ol francaj akademianoj.

Germana influo, precipe antaŭmilita, montras sin tie tre forta, sed fuŝkomprenata. Eksteran disciplinon de antaŭmilita Germanio, ili simie imitas. Sed metodon, purecon, hiĝienon, kulturon . . .

Dudek okazojn reveni Eŭropon mi trovis. Sed kial Eŭropon? Sur mia ŝipo mi povis dungiĝi por terpomlaboro, — sur Marsilia ŝarĝo-ŝipo mi povis reveni al Francio kiel helpmaristo, ktp. Sed mi restas. Hispanan lingvon mi lernos, kaj post unu aŭ du jaroj, Nordamerikon!

Kaj poste, eble, "ĉirkaŭiron" mi faros. (Ĉirkaŭiron de l' mondo. Rim. de l' trad.)


Alejandro, 22. 10. 1929.

Marsel' F.

(Libera traduko de 7359.)

POR PROLETA SANO

En la ĝardeno de l' sanigejo "Djulber", kiu lokiĝas ĉe la bordo de l' Nigra Maro, en roko super monta fonto troviĝas alfiksita tabuleto, kiu sciigas la leganton, ke "en la jaro 1897, la 4-an de oktobro, iliaj geimperiestraj moŝtoj . . . sukcese alvenis sian bienon Djulber."



Stranga koincido . . . Ĵus en oktobro, post dudeko da jaroj, orumitaj nenionfaruloj devis treege malsukcese kaj treege neatendite forlasi sian bienon . . .

En la jaro 1920, kiam lastaj restoj de blanka armeo formalaperis el Krimeo en Nigran Maron, la voĉoj de novaj posedantoj eksonis sub maŭritanaj arkoj de la palaco, kaj baldaŭ la unua grupo da proletoj — malsanuloj kaj ripozantoj venis al denun *sia* bieno Djulber.

En la jaro 1927 en Krimeo okazis tertremo, kaj la grandega orienta palaco ekŝanceliĝis kiel infana kartokastelo. Du grandegaj fendoj ekserpentumis sur la delikata ornamaĵo de la palaco.

Sed la novaj mastroj ne ektimis. Jam post duonjaro oni komencis riparlaboron. Fera trabaro interne estas instalita. Nenia nova tertremo nun estas danĝera por ĝi. Lertaj masonistoj kaj stukistoj riparis la eksterajn murojn. Samtempe la palaco estas interne rekonstruita. Grandampleksaj salonoj per vandoj estas transformitaj je komfortaj helaj ĉambroj. Anstataŭ malhela palac-preĝejo ornamita per bildoj de ĉiaspecaj sanktuloj, nun lokiĝas ĉambroj plenaj da lumo kaj aero.

Granda kuirejo, konstruita laŭ lastaj atingoj de gastronomia tekniko, estas preta por satnutri 110 estontajn loĝantojn de la sanigejo. Speciala levmaŝino portos manĝon al manĝoĉambro. Akvokonduko, kanalizo, bankuvoj, duŝoj, terasoj por sun- kaj aer-banado estos baldaŭ pretaj.

La novaj mastroj bone eltenis ekzamenon. Post la tertremo la palaco estas renovigita fervore kaj zorgeme, kaj nuntempe ĝi aspektas ne malpli bele, ol dum la tagoj, kiam rigardoj de altranguloj indiferente tuŝetis ĉi tiujn altajn plafonojn.

La unuan de majo 1930 la pordegoj de la sanigejo malfermiĝos por akcepti la unuan grupon da gastoj — laboristoj-malsanuloj kaj ripozantoj. Kaj ne malica car-kortegano renkontos ilin, sed nia frato-proleto, estinta ĝarden-gardisto kaj nun — laŭ volo de Oktobro — administranto de unu el la plej belaj sanigejoj ĉe la suda bordo en Krimeo . . .

Kompil-trad. laŭ "Ekrano" 5466.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO"

La intelekta libero estas nepre necesa

Ju pli estos da diversaj doktrinoj, kiuj celos akiri la konsenton de la homaro, des pli tio efikos por la estonta k fina interkonsento. La evoluado en la spiritoj, kiel la materia evoluado, ĉiam estas transiro de samnatura stato al malsamnatura: faru kompletan unuecon en la intelektoj, vi neniigos la intelektojn mem; prilaboru ĉiujn spiritojn laŭ la sama plano, donu al ili la samajn kredojn, la saman religion, la saman metafizikon, samigu la homan penson, vi tutcerte kontraŭos la esencan tendencon de l' progreso . . .

Oni diras: "la vero estas unu; la idealo de l' penso estas tiu unueco mem tiu unuformeco."

Via absoluta vero estas ia abstrakto, kiel la perfekta triangulo aŭ la perfekta cirklo de la matematikistoj; en la realo ĉio estas senlime multobla. Tiel, ju pli estas da malsame pensantaj homoj, des pli granda estas la sumo da vero, kiun ili sukcesos ampleksi k pri kiu ili finfine interkonsentos. Oni do ne devas timi la diverson de la opinioj, male oni devas ĝin elvoki: du homoj havas malsaman opinion, des pli bone eble; ili multe pli proksimas al la vero ol se ili estus samopiniantoj . . .

La vero estas kiel la lumo, ĝi ne venas el unu sama punkto; ĝi estas resendita al ni de ĉiuj objektoj samtempe; ĝi trafas nin el ĉiuj flankoj k per ĉiuj manieroj: oni devus havi cent okulojn por kapti ĉiujn ĝiajn radiojn. La homaro havas milionojn da okuloj k da oreloj; ne konsilu al ĝi fermi ilin aŭ streĉi ilin al la sama flanko: ĝi devas malfermi ĉiujn samtempe, direkti ilin al ĉiuj flankoj; estas necese, ke la multego de ĝiaj vidpunktoj respondu al la multego da objektoj.

La diverso de la doktrinoj atestas pri la riĉo k la potenco de l' penso: tiel tiu malsamo, anstataŭ malkreski kun la tempo, kreskos en la detaloj, eĉ se ĝi atingus interkonsenton en la tuto.

La divido en la penso k la diverso en la intelektaj laboroj estas same necesa kiel la diverso en la metiaj laboroj: tiu labordivido estas kondiĉo pri ĉia riĉo.

Iam la penso estis treege malpli dividita ol en nia epoko: ĉiuj estis influataj de la samaj superstiĉoj, de la samaj dogmoj, de la samaj eraroj; kiam oni renkontis individuon, oni antaŭe povis, nekonante lin, diri: "jen estas tio, kion li kredas"; oni povis nombri la absurdojn, kiujn entenis lia kapo, fari bilancon pri lia cerbo. Nuntempe ankoraŭ, multaj homoj el la malsuperaj aŭ superaj klasoj restas en

tia stato: ilia intelekto estas modlita laŭ difinita tipo.

Feliĉe la nombro de tiuj spiritoj malgrandiĝas ĉiutage: la rolo de la iniciativo kreskas; ĉiu tendencas fari al si sian leĝon k sian kredon. Estas dezirinde, ke neniam estos ie *ortodokso,* mi volas diri ĝenerala kredo ampleksanta ĉiujn spiritojn; la kredo estu *individua,* la neortodokso estu la vera k universala religio . . .

La reĝoj malaperas; la pastroj ankaŭ malaperos . . .

Voli regadi la spiritojn estas eĉ pli malbone ol voli regadi la korpojn; oni devas malkonsenti al ĉia "konscienc-direktado" aŭ "pensdirektado" k konsideri ilin kiel malfeliĉegon.

La ordonemaj metafizikoj k la religioj estas vindoj, taŭgaj por infanpopoloj: estas tempo por ke ni iru solaj, por ke ni abomenu la ŝajnigajn apostolojn, la misiistojn, la predikistojn el ĉiuj specoj, por ke ni estu niaj propraj gvidantoj k ke ni serĉu en ni mem la "rivelon".

Kristo ne plu estas: ĉiu el ni estu Kristo por si mem, laŭplaĉe k laŭpove ligu sin al Dio, aŭ malkonfesu Dion . . .

Sur la intelekta kampo ne povas okazi perforta k subita revolucio, sed nur evoluado pliintensiĝanta kun la paso de l' jaroj: estas eĉ tiu malrapido de la spiritoj en kompreno de la rezonoj, kiu, sur la socia kampo, fiaskigas la tro rapidajn revoluciojn. Tial — *kiam temas pri pure teoria esplorado* — la malpli danĝeraj homoj k la pli utilaj estas la plej revoluciaj, tiuj, kies penso estas la plej sentima: ili povas tiom malmulte influi! La ŝtormo, kiun ili naskas en iu malgranda angulo de l' Oceano, apenaŭ produktos sur l grandega akvoamaso nevideblan ondon . . .

M. Güjo (Guyaŭ)

El "Skizo pri moralo sen devigo nek sankcio[1]" tradukis el la franca. *Herezulo*

[1] La vorto estu komprenata jene: *sen puno nek rekompenso,* pĝ. 166, 167, 168 de la XIII-a eldono.

SPR

En februaro aperos la unua kajero de

Sennacieca Pedagogia Revuo 32 paĝoj

Kun tre varia enhavo

Abontarifo por jaro (6 kajeroj): formato de "La Nova Epoko", sur la bazo de 1/2 dol. amerika

Abonu!

FILOZOFI-POLITIKA EDUKADO

En la kampara edukejo Valkenmüle (Walkenmühle) (Germanio, apud Melsungen) okazis en aŭg. 1929 la membrarkunveno de la Unuiĝo de l'amikoj de la filozofi-politika akademio.

Aktive kaj sukcese la unuiĝo komencis sian laboron. Ĝia tasko estis havigi la kapitalon por starigi kaj pligrandigi liberan akademion kaj ĝiajn aligitajn lernejojn. Tiuj institutoj formu edukistojn kaj gvidantojn laŭ senco de la filozofiaj kaj pedagogi-politikaj principoj, kiujn priskribis Leonard Nelson en siaj verkoj. D-ro Artur Kronfeld, profesoro Otto Mejerhof, profesoro Franz Openhaimer kaj Minna Speht raportis pri la fondinto de l' unuiĝo en broŝuro de decembro 1928: "Je la 29-a de oktobro 1927 Leonard Nelson mortis, nur 45-jara. Li plenumis tion, kion nur malmultaj homoj sukcesis antaŭ li: per necedema seriozo kaj eksterordinara severo kontraŭ si mem, li vivis, kiel etik-politika gvidanto, laŭ la vivmaniero, kiun li instruis kiel filozofa pensulo, Leonard Nelson — ni uzu liajn proprajn vortojn — "konsiderante la detruon de tuta socia ordo, kuraĝis, dubi ne je racio, sed je racieco de la nuna socia ordo. Kaj li riskis sian vivon por kunhelpi, 'savi la honoron de homa racio'."

La kunvenon ĉeestis amikoj el Anglio, Ĉinio, Germanio, Svisio kaj Usono. D-ro Grete Hermann raportis pri Edukado kaj instruado. Ŝi pritraktis kelkajn paragrafojn de la (ĝis nun ne jam publikigita) 2-a volumo de La Lekcioj pri la fundamentoj de etiko: Sistemo de filozofiaj etiko kaj pedagogio de Leonard Nelson. Jen kelkaj esencaj pensoj: Etiko postulas eduki al veremo, belemo kaj justemo. Justeco estas la unua kondiĉo por iu valoro de ia socio. Do, la unua tasko pedagogia estas, eduki al justemo. Profesoro Franz Openhaimer parolis pri Taskoj kaj metodoj de enlanda koloniigo. Li montris, kiel Leonard Nelson, serĉante kiel filozofo plenumeblecon por siaj etikaj postuloj, renkontis ekonomian politikiston, Franz Openhajmer, al kiu mankis la lasta filozofia pravigo. Ili renkontiĝis kaj komencis komunan laboron. Fakte la Openhajmer-a batalo kontraŭ la termonopolo estas paŝo sur la politika vojo de Leonard Nelson.

Por multaj partoprenantoj la plej interesa parto de la tago estis la vizito tra Valkenmüle. La Valkenmüle prave nomiĝas internacia edukejo. Ĉi tie estas germanoj kaj alilandanoj. La Valkenmülanoj — instruistoj, lernantoj kaj helpantoj — formas tuton: neniu estas inter ili, kiu ne eksekleziiĝis, kiu ne vivas vegetare kaj alkohol-abstinente, kaj neniu, kiu ricevas salajron. La plej aĝaj lernantoj, preskaŭ ĉiuj junaj laboristoj kaj laboristinoj, trapasas trijaran instruon praktikan kaj teorian. Ili laboras en la seruristejo, lignaĵejo, en la ĝardeno kaj ĉe kamparanoj. Ili studas matematikon, fizikon, lingvojn (esperanton, germanan kaj anglan lingvojn), ekonomion, politikon kaj filozofion. Sed io pli valoras: ili trovis hejmon, ejon de politika klerigo kaj moral-karaktera plifortigo.

Krom la kampara edukejo Valkenmüle ekzistas akademio, kies konstruo staras aparte de la edukejo. La laboro de la akademio estas komencata. Ĉisomere tie jam okazis kelk-semajnaj kursoj por filozofia kaj politika perfektigo de la lernantoj de Leonard Nelson kaj anoj de lia politika laboro.

En ega silento kaj izolo ĉi tie estas farata eduk-ago, kiu jam devas akiri decidan influon sur publikan vivon.

Rauschenplat.

(El la Esp. Paĝo de l' revuo Mondo.)

★

En kunesto kun grandaj spiritoj

Dio mortis; sed atentu: postrestas ombroj de Dio. Post la morto de Budho oni montris ankoraŭ dum jarcentoj lian ombron en kaverno, ombron grandegan kaj timegigan. Dio mortis; sed la homoj estas tiaj, ke oni eble ankoraŭ dum jarmiloj montros lian ombron en kavernoj.

Niĉe (Nietzsche).

*

Ĉiu konservativulo devenas de rabisto. Kiam Herkulo estis ŝtelinta la bovojn de kakuso, li fariĝis furioza defendanto de privata posedrajto.

E. Renan.

*

Ĉiufoje, kiam krimulo sukcesis elrabi kaj ruinigi, mortigi milojn kaj milojn da homoj, kiuj neniam estis farintaj ion kontraŭ li, oni elektis lin kaj solene ŝmiris lin per sanktaj oleoj: li ja kompreneble estis filo de Dio.

L. Tolstoj: "Eklezio k Ŝtato".

*

Leĝoj! Ĉiuj scias, kio ili estas kaj kion ili valoras. Araneaĵoj por la potenculoj kaj la riĉuloj, nerompeblaj katenoj por la malaltuloj kaj la malriĉuloj, fiŝretoj en la manoj de l' registaro. Prudon (Proudhon).

*

Burĝaro fabrikas intelektulojn, kiel ĝi fabrikas ŝuojn — almezure sian piedon. P. Lafarg' (P. Lafargue).

*

Perforto estas la granda akuŝistino de l' nunaj socioj. K. Marks.

*

Ni jam diris, ke perforto konsistigas por la ĉiamaj perfortitoj nur defendan armilon. Jes, estas ja prave kulpigi pri l' atako la jarcentajn subpremantojn. Sed perforto konsistigas pli ol armilon, ĝi estas la ununura rimedo por konstrui la juston. Ne estas armilo, estas ilo. H. Barbüs' (Barbusse)

"La tranĉilo inter la dentoj".

Esperanto-Servo

N-o 17 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 23. Januaro 1930

EL RUMANIO

Atestanto katenite antaŭ klas-juĝistaro

(Esperanto-Servo.) La tribunalo en Deva okazigis proceson por nuligo de la laborist-sindikata Vulkana-Unuecorganizo. Kiel atestanto ankaŭ estis nomigita K-do Dan, sekretario de la lignaĵlaborista asocio. Anstataŭ invito ĝendarmo arestis K-don Dan, k malgraŭ forta protesto 10 ĝendarmoj poste katenigis k akompanis lin. Sur stratoj de la urbo Deva K-do Dan ekkriadis: Tiel aspektas la leĝeco k demokratio en Rumanio! Kaj strange: tiun atestanton finfine la tribunalo tute ne aŭskultis, sed simple verdiktis la nuligon de la Vulkana-Unuecorganizo . . . *Role.*

Ĉe la tombo de fi-mortigita K-do

(Esperanto-Servo.) En unuaj tagoj de januaro ĉ. 40 junlaboristoj el urbo Timiŝ vizitis la tombon de la fi-mortigita K-do, inĝeniero Johano Fonagy. Ili ĉirkaŭstaris lian tombon, k subite eksonis revoluciaj funebraj kantoj. Oni rememoris pri liaj agoj k vivo. pri la mortiga karcero "Doftana". La rumania proletaro neniam forgesos pri siaj mortigitaj klasfratoj k la fiagojn de la faŝista Maniu-registaro, kiu aranĝis la provokan sangverŝadon la 7-an de aprilo 1929. Fine ni venkos . . . *Role.*

EL POLIO

Arestigoj en tombejo dum enterigo

(Esperanto-Servo.) En Vilno okazis entombigo de membro de la Blankrusia Lernej-Asocio k de estinta Gromada (Gromada estas malpermesita de la faŝista Pilsudski-registaro). Antaŭ la tombejo la amaso kolektiĝis k kelkcentoj da personoj ekkantis la Internacion en rusa, juda k blankrusa lingvoj. Oni ankaŭ aŭdis "kontraŭ ŝtatajn" devizkriojn k disdonis komunistan flugfolion. Tuj venis la polico k provis "trankviligi" la manifestantojn. Kiam la sekretario de la maldekstra Pola Socialista Partio komencis oratori, subite la polico faris atakon en la tombejon k arestis la oratoron kun 46 Gek-doj. *Laborulo*

Cionistaj faŝistoj provokas

(Esperanto-Servo.) La 22-an de decembro en Lodz la cionista organizo "Hitaĥdut" (judaj faŝistoj) aranĝis provokan kunvenon, en kiu ili protestis kontraŭ subpremo de la cionista movado en Sovetio. La laboristaro de Lodz amase venis k senvualigis la faŝistan vizaĝon de la organizintoj. Ĉar la faŝistoj ne volis enlasi plej grandan parton de la laboristoj, komenciĝis interbatalo, k la rezulto estis, ke ĉiuj fenestrovitroj estis rompitaj. La faŝistoj vokis la policon, kiu lasta arestis kelkajn K-dojn. *Laborulo.*

Man-ŝuistoj kontraŭ ŝu-fabriko

(Esperanto-Servo.) Antaŭ kelkaj semajnoj malfermiĝis en Lodz filio de la ĉeĥoslovaka firmao "Bata", kiu produktas maŝin-ŝuojn. La manŝuistoj vidis en tiu fabriko grandan malutilon, ĉar nuntempe jam ili malmulte perlaboras, k ili provis defendi sin kontraŭ konkurad-atakoj flanke de la kapitalisto Bata. Ili venis antaŭ la vendejon de "Bata" k per ŝtonoj rompis kvar grandajn fenestro-vitraĵojn je valoro de ĉ. 900 dolaroj. En lastaj tagoj okazis protest-kunvenoj de led-laboristoj, kiujn partoprenis miloj da senlaboraj ledlaboristoj, kies familioj vivas en granda mizero. *Laborulo*

EL GERMANIO

Ribelo sur la germana ŝipo "Emden"

(Esperanto-Servo.) La 13-an de oktobro 1929 troviĝis la germana ŝipo Emden antaŭ Puerto Columbia. La oficiroj de la ŝipo jam ĉiam diboĉadis k la maristaro ricevis malbonan manĝaĵon k havis tre pezan deĵoron. La maristaro ribelis, suprentiris ruĝan flagon k kantis la Internacion. La juĝo kondamnis du maristojn je kvinsemajna aresto. Reakciaj gazetoj ĝemas: komunistoj havas interligon kun la maristaro de la germanaj naĝantaj fortikaĵoj. *10 596, Nieder-Salzbrunn.*

El la "libera" germana respubliko

(Esperanto-Servo.) Redaktoro de la silezia komunista "Laborista Gazeto" skribis okaze de varbado: "varbu novajn soldatojn por la proletara revolucio!" Kaŭze de tio la regna juĝejo en Leipzig kondamnis la komunistan redaktoron pro landperfido al unu jaro da aresto. "Liberio", super ĉio . . . *10 596, Nieder-Salzbrunn.*

EL ANGLIO

Kongreso de "Instruista Laborista Ligo"

(Esperanto-Servo.) La 3-an ĝis 5-an de januaro okazis ĉe Biĉroft, laborista eduka centro en Birkenhead, la oka ĉiujara kongreso de la "Instruista Laborista Ligo". Ĉeestis la kongreson ĉ. 50 delegitoj k ankaŭ multaj amikoj el diversaj partoj de la lando. Alvenis salutoj de la portugala k amerika fakoj de l' "Eduka Laborista Internacio" k de l' "Eduka Laborista Unuiĝo" de Blankrusio (lasta raportis pri la sukcesoj de la kvinjara plano k estis en esp-o). Dum sabata kunveno okazis tre vigla k plensugesta diskutado pri la temo "partieco en edukado". Dum la kongreso oni traktis plej diversajn temojn, kiuj speciale koncernas la edukadon laŭ laboristaj principoj. La kongresanoj i. a. decidis: malfiliiĝi de la Laborista Partio; forigo de lernejestroj, kiuj servas al la kapitalista klaso; reoficigo de instruistinoj, maldungitaj pro edziĝo, kiel paŝo de ekonomia k socia liberiĝo de virinoj. La kongresanoj forte protestis kontraŭ decido de la Birkenhead-a magistrato, kiu malpermesis al ili, montri dum dimanĉo nuran edukan filmon "vizito al Sovet-Rusio".

Anni Shipman (9044), Birkenhead.

EL SOVETIO

Lingvaj reformoj en Rusio

(Esperanto-Servo.) La "grav-administracio" (Glavnauka) — ne miksu kun popolkomisarejo por klerigo — konfirmis 3 komisionojn por esploradi reformigon de la rusa lingvo je 3 gravaj punktoj: 1. ortografio, 2. sisttemo de punktoj, 3. latinigo de la rusa alfabeto. *Fedorowsky, Kasatin.*

225 000 000 rubloj por kulturlaboro

(Esperanto-Servo.) La prezidantaro de Tutsovetia Centra Konsilantaro de Profunuiĝoj difinis elspezojn por kulturlaboro en jaro 1930 de 225 000 000 rubloj, anstataŭ 145 000 000 rubloj en pasinta jaro.

Esperkoro, Samara.

Oni "raciigas" sonorilegojn

(Esperanto-Servo.) Laŭ persista postulo de laboristoj, la soveto de urbo Samara decidis, ĝis 15-an de januaro forpreni de ĉiuj preĝejoj en urbo Samara la sonorilegojn k doni ilin al la fabrikoj. De la mono tiuvoje ricevita, preskaŭ 300 miloj da rubloj estos uzataj por konstruado de domo de kulturo. Urba soveto de Samara alvokis ĉiujn urbojn de la Sovetunio, tiudirekte imiti. *Filippova, Tver.*

17-a listo de raportoj en jaro 1929/30

109. Atestanto katenite antaŭ klas-juĝistaro. Role (Rumanio).
110. Ĉe la tombo de fi-mortigita K-do. Role (Rumanio).
111. Arestigoj en tombejo dum enterigo. Laborulo (Polio).
112. Cionistaj faŝistoj provokas. Laborulo (Polio).
113. Man-ŝuistoj kontraŭ ŝu-fabriko. Laborulo (Polio).
114. Ribelo sur la germana ŝipo "Emden". 10 596, Nieder-Salzbrunn (Germanio).
115. El la "libera" germana respubliko. 10 596, Nieder-Salzbrunn (Germanio).
116. Kongreso de "Instruista Laborista Ligo". Anni Shipman, Birkenhead (Anglio).
117. Lingvaj reformoj en Rusio. Fedorowsky, Kasatin (Sovetio).
118. 225 000 000 rubloj por kulturlaboro. Esperkoro, Samara (Sovetio).
119. Oni "raciigas" sonorilegojn. Filippova, Tver (Sovetio).

SENNACIULA SCIENC-KULTURA PAĜO

N-o 23 Sub la kontrolo de Scienc-Kultura (Akademia) Sekcio de SAT. Redakci-adreso: Dim. Snejko, Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio) N-o 23

De l' Redakcio

Hodiaŭ ni donas lokon por artikolo de d-ro Karanoviĉ pri soveta medicino; ni tion faras responde al multaj demandoj pri stato de medicina afero en USSR k responde al malveraj informoj de "s-roj" vizitintaj USSR-on. —

Vegetaranoj, alkoholuloj, vivsekcanoj k aliaj, ni volas aŭdi vian voĉon.

Redakcio.

SOVETA MEDICINO DUM 12 JAROJ

D-ro Karanoviĉ.

Grandega Oktobro enskribis novan paĝon en historio de rusa medicino La medicina organizo de cara tempo. portinta sur si ĉiujn trajtojn de kapitalista reĝimo (medicino pli bona por riĉuloj, malbona — por malriĉuloj. preskaŭ plena foresto de profilaktaj rimedoj estis forbalaita de Oktobra revolucio kaj sur ĝia loko aperis Soveta medicino.

La fundamentaj reguloj de Soveta medicino estas: *Unueco de administrato kaj gvidado, atingeblo por ĉiuj. senpageco kaj altkvalifiko de medicina helpo, kunigo de saniga kaj profilakta laboro, aktiva partopreno de larĝaj amasoj de gelaboristoj kaj gekamparanoj en konstruado de la sangardo.*

Kiaj do estas atingoj de Soveta medicino, kies komenco estis fondita antaŭ dekdu jaroj je la tagoj de Grandega Oktobro? Antaŭ ĉio oni devas rimarki, ke al la juna soveta respubliko restis el la carismo peza sanitara heredaĵo. Dum cara reĝimo al Rusio apartenis malĝoja privilegio esti en la unuaj vicoj inter aliaj landoj de la mondo rilate morton de loĝantaro. En la jaroj 1903—1913 en Rusio ĉiu milo da loĝantoj havis 28,4 mortintojn. Infana morteco dum tiu ĉi periodo atingis grandegajn ciferojn: dum unu jaro po milo estis 250—260 mortoj inter infanoj unujaraj. Komence de la jaro 1923, kiam la epidemio estis jam iom malaltiĝinta, kiam ekonomiaj cirkonstancoj de USSR pliboniĝis, la mortado forte falas: en eŭropa parto de Rusa Socialista Federacia Soveta Respubliko dum la jaro 1924 mortoj estis je milo da loĝantoj — 24,0 kaj dum la j. 1927 — 21,7; en Blankrusio dum la samaj jaroj — 15,0 kaj 14,1. Kune kun tio pligrandiĝis natura elkresko de la loĝantaro (en 1924 po 1000 loĝantoj okazis elkresko je 19,19, en 1925 — 21,11 kaj en 1926 — 23,2.

Dua montrilo de malalta *sanitara stato* en antaŭrevolucia Rusio estas malsaniĝo de l' loĝantaro. Ĝenerala nombro da registritaj gemalsanuloj en Rusio dum 1914 konsistis el 98 045 233 da kazoj, t. e. po milo da loĝantoj — 603, el ili sur videbla loko staras infektaj malsanoj — 11 843 088 kazoj, sekvas parazitaj malsanoj (skabio, favo) — 7 277 477 kazoj, sociaj malsanoj (tuberkulozo kaj veneraj) — 2 831 955, kaj trakomo (okulmalsano) — 891 568 kazoj.

Sekvanta tabelo donas prezenton pri malgrandigo da montriloj de epidemiaj malsaniĝoj kompare kun cara tempo.

Nomoj de malsanoj	j. 1913	1925	1926	1927
Ekzantema tifo . .	7,3	5,2	3,7	2,8
Revena tifo	1,2	1,4	1,1	0,5
Ventra tifo	26,8	12,4	11,9	10,0
Variolo	4,4	1,3	1,1	0,95
Malario	216,6	338,8	304,7	249,9
Morbilo	34,5	46,4	28,5	32,0
Skarlatino	28,3	19,3	23,7	24,2
Difterio	31,1	5,0	5,1	5,6

El ĉi tiu tabelo antaŭ ĉio estas videble, ke en antaŭrevolucia Rusio epidemia malsaniĝo estis treege alta. Pro plibonigo de sanigaj rimedoj, kiuj estas larĝe enkondukitaj en Soveta lando, malsaniĝo pro infektaj malsanoj sufiĉe multe malgrandiĝis kompare kun antaŭmilita tempo.

Interalie malsaniĝa kvoto pro parazitaj tifoj malgrandiĝis je duoblo kaj variolo je 4-oblo kompare kun j. 1913. Malsaniĝa kvoto pro variolo malgrandiĝis sendube pro la dekretoj de l' registaro en la jaroj 1919 kaj 1924 pri enkonduko de deviga variolinokulado. Tamen en vico da regionoj eĉ nun parazitaj tifoj kaj variolo ankoraŭ donas grandajn ciferojn da malsaniĝoj. Likvido de ĉi tiuj malsanoj estas tasko de la tago.

Rilate al pligrandiĝo de malsaniĝoj pro malario kompare kun antaŭmilita periodo (povas esti, ke tio montras, ke nuna statistiko estas pli bona?), oni devas diri, ke kontraŭ tiu ĉi malsano ni ankaŭ sukcese batalas. Signifoplena malaltigo de mortoj kaj epidemiaj malsaniĝoj montras kun sendubo, ke sanitara stato de Sovetio pliboniĝas. Tamen oni ne povas ne agnoski, ke sanitara stato de la respubliko, precipe en vilaĝaj lokoj, dezirigas multe pli bonon. La proksima tasko estas plua plibonigo de sanigaj rimedoj en loĝataj regionoj.

Ĝeneralaj sanigaj rimedoj devas komenciĝi ĉe gardo de sano inter la neplenaĝa generacio, kaj gardo de infano, zorgo pri la patrino. Jen pro kio en Sovetio la plej ĉefa zorgo estas direktata je gardo de patrineco, suĉinfaneco kaj infaneco. La organizo de gardo de patrineco kaj suĉinfaneco estis konstruita sur malplena loko, ĉar malnova medicina organizo preskaŭ ne sciis tiun ĉi agadon. Unu el la plej gravaj taskoj de zorgo pri patrineco kaj infaneco estas batalo kontraŭ infana morteco. Ĉi tiu tasko plej celkonforme efektiviĝas per konsulto por infanoj. Dum j. 1927/28 en USSR tiaj konsultejoj estis 1,470. La laboro de konsultejoj helpis malaltigi infanan mortecon: dum la jaro 1924 morteco de la infanoj ĝis 1-jaraj estis 21,7%, dum j. 1925 — 21,3%, dum j. 1926 19%. Por ke virino povu kunigi patrinecon kun profesia laboro — ekzistas vartejoj kaj domoj por patrinoj kaj infanoj. Nombro da regionaj kaj fabrikaj vartejoj en USSR en la jaro 1927 estis 864, kaj la domoj por patrinoj kaj infanoj atingis 127. En la vilaĝoj oni organizas somerajn vartejojn, kies nombro en la jaro 1926 en USSR atingis 4,128.

La saman atenton Soveta potenco donas al la gardo pri sano de iom pli aĝaj infanoj, pro kio ekzistas granda reto da oficejoj.

Plie, al la nombro da laboroj por ĝenerala sanigo apartenas batalo kontraŭ sociaj malsanoj — tuberkulozo kaj sifiliso. Dum kompare mallonga tempo de ŝtata batalo kontraŭ tuberkulozo en USSR ĉi tie ni havas grandajn atingojn. En la centro de batalo kontraŭ tuberkulozo kaj sifiliso estas starigita dispansero[1], t. e. la oficejo, kiu ne nur donas medicinan helpon, sed ankaŭ enkondukas ĝeneralsanigajn rimedojn. Ĉiuj dispanseroj je la fino de la jaro 1926 en USSR estis 418.

Kio rilatas al tuberkulozaj kuracejoj, tiaj ĉe la fino de l' jaro 1927 en USSR estis 232 kun 16 343 litoj. Dum lastaj jaroj la dispanseroj komencis eniĝi ankaŭ vilaĝojn.

Nombroj da veneraj dispanseroj en urboj en la jaro 1926 atingis 250. En vilaĝaj lokoj kontraŭ veneraj malsanoj sukcese batalas veneraj taĉmentoj kaj "punktoj", kiuj ne nur disvolvas kurac-profilaktan laboron, sed ankaŭ esploran. *(Finota.)*

Nova malpeza metalo

La malpeza metalo *berilio*, kiu nune per tre komplika vojo estas produktata en Usono k Germanio, montriĝis kiel metalo kun mirindaj ecoj k pro tio akiros iam grandan signifon. Etaj aldonoj de berilio al kupro faras ĝin malmola kiel la plej hardita ŝtalo, sen ke la tiel preparita kupro perdus sian elektran kondukivon. Kunfandita kun aluminio ĝi estigas malpezan metalon de granda elasto k malmolo. Etaj aldonoj de kelkaj centonaj elcentoj al

[1] Dispansero tre diferencas de dispensario (fr.: dispensaire, angle: dispensary); tial ni uzas alian vorton.

TRA ESPERANTIO

NI KANTU!

Estas tre salutinda la propono de K-do D. K. en n-o 270, elekti kelkajn kantojn, kiujn ni dum grupvesperoj k okaze de renkontiĝoj povus komune kanti. Mi ofte okazigis kantvesperojn, k ili estis la plej bonvizitataj. Ĉiuj K-doj, ĉu junaj, ĉu plenaĝaj, tre ŝatas kanti; precipe dum la maja manifestacio sub flirtanta flago ni multe kantis atentigante la kunmarŝantojn pri nia ideo. Kantoj ĝojigas, entuziasmigas la animon por la proleta afero; pro tio ni kantu.

Por ke ni povu efektive interfratiĝi en okazo de renkontiĝo, ni urĝe bezonas unuecajn kantojn: la SAT-Kantaro estu nia modela helpanto, ĝin apliku la tutmonda prol. esp-istaro. Ege bedaŭrinda fakto malhelpa estas, ke en div. landoj oni kompilis k eldonis sian nacian kantaron. Oni eĉ enmetis kantojn el aliaj kantaroj ignorante la SAT-an, disvastigitan mondskale. Mi klare ilustros al vi la rezulton de tiu bedaŭrinda fakto. Antaŭ tri jaroj mi komencis instrui la grupanojn per mia gitaro pri div. kantoj (n-oj 11, 3, 25, 12, 14, 44 k. a. el SAT-Kantaro). Oni kantas parkere. Pasintjare (1928) ALLE eldonis novan kantareton sennotan k ĝi entenas la kantojn n-ojn 11, 3 k 25 el SAT-Kantaro, sed la kompilinto pro negravaj kaŭzoj ŝanĝis vortojn, eĉ frazojn; la novaliĝintoj kantas nun laŭ ŝanĝita teksto k la malnovaj Gek-doj laŭ teksto malnova. Nun vi povas imagi, kiel nin konfuzas tiu miksaĵo; la Gek-doj ridas, skuas la kapon demandante unu la alian pri la kaŭzo. Nu, se unu sola grupo ne kapablas kanti samtekstan kanton, kiel do K-doj kunvenantaj el div. landoj sukcesus! Estas nia devo malebligi tian fuŝadon, aprobante k aplikante la proponon de K-do D. K. Oni ne kontraŭstaru la lernadon de tiuj kantoj; precipe ni kantu "La Internacio"n, sed ne ĉiujn 6 strofojn, ĉar oni bezonas 15—20 minutojn, k ĝi fariĝus enuiga k banala. En kunveno k dum marŝado oni kutime kantas la unuan k lastan strofojn. Mi rekomendas lerni la kantojn n-ojn 3, 11, 12, 14; ili estas facillerneblaj, belsonaj, entuziasmigaj. N-oj 12 k 14 estas duvoĉaj, pro tio iomete pli malfacilaj, sed tiom pli agrablaj k bonefikaj; el n-o 12 ni kantu la 1., 3., 4. k lastan, k el n-o 11 la unuan k lastan strofojn. Do, eksonu niaj kantoj sennaciece!

Postl (Aŭstrio).

Esperanto en partia tago de Finnlanda soc. dem. Partio

Dum la venonta partia tago de Finnlanda socialdemokrata partio, kiu komenciĝos la 26-an de nuna januaro en Helsinki, estos i. a. pritraktata por-esp a propono. Por konigi la proponon k ties ĉefan enhavon al eksterlandaj K-doj, ni komunikas ĝian finrezolucion:

"La partia tago devigas: 1. partian gazetaron konigi la ideon de internacia lingvo k la rezultojn de esp-o inter la laboristaro; 2. socialdemokratan parlamentan grupon iniciati, ke esp-o fariĝu lernofako en seminarioj de popollernejaj instruistoj, mez- kaj popollernejoj, daŭrigaj klasoj de popollernejoj k laboristaj institutoj; 3. partian estraron aliĝi al la proponoj de aliaj fratpartioj, celantaj igi esp-on la oficiala lingvo de Socialista Internacio Laborista k ke la partia estraro uzu esp-on en sia internacia korespondado."

La propono k finrezolucio estas jam pritraktitaj en la partia estraro k ĝi proponas — bedaŭrinde — ian malbonigon de l' rezolucio. Eksterlandaj K-doj k fratorganizoj esprimu sian opinion pri la internacia lingvo al la kunvenonta partia kongreso de Finnlandaj socialdemokratoj laŭ jena adreso: Kongreso de Finnlanda Socialdemokrata Partio, Helsinki.

NI KUNVENU EN PROPRAJ HEJMOJ!

"Kie estas volo, ankaŭ estas vojo," — ni diras kun la proverbo. La kunveneja problemo por multaj grupoj estas unu el la plej malfacile solveblaj. Post longaj priparoloj k interkonsiliĝoj nia Kemnica (Chemnitz-a) grupo venis al jena solvo: Ni intencas krei propran hejmon, nur per niaj malfortaj monrimedoj. Jam estas luprenitaj 400 kvadratmetroj da herbejo. Malnovan fervojan vagonon ni mendis, kiun ni povos havi en printempo. Ĝi kostas 350 ĝis 450 germ. markojn, el kiuj ĝis nun nur 150 mk. g. povis esti kolektataj. La mankantan sumon ni intencas pruntepreni ĉe iuj ankoraŭ nekonataj personoj. La herbeja luprezo estas negrava (10—15 mk. g. jare); proksimume 15 mk. g. ni bezonos por rentumo. Sekve post akiro de la necesa restsumo ni havos belan hejmon, kiun ni mem laŭplaĉe povos instali k ĉiam havos je nia dispono sen speciala kotizo aŭ devigo por la membroj elspezi ion por alkoholaj trinkaĵoj, kiel kutime okazas en la esp. kunvenejoj, — almenaŭ en Germanio. Senpage eĉ ĉiu ricevos kiel donacon freŝan arbaraeron, ĉar nia estonta hejmo staros en plena libero. Eble por aliaj grupoj tiu ekzemplo estos instigo, solvi laŭ sama maniero tiun gravan problemon.

W. M. Zinke (1305), Germ.

INTERESA STATISTIKO

K-do *P. Epifanoviĉ (13 155)*, Usono, sciigas al ni la sekvantan interesan rezulton de siaj korespondanoncoj en "S-ulo": Sume li ricevis pli ol 400 poŝtkartojn k multajn leterojn, fotojn, ĵurnalojn ktp.; inter ili el Sovetio 120 PK, el Germanio 95, Aŭstrio 35, Japanio 25, Ĉeĥoslovakio 17, Francio 17, Belgio 10, Jugoslavio 10, Polio 8, Hungario 8 ktp. Li ricevis ankaŭ kelkajn monpetojn (el Eŭropo) k unu fraŭlino eĉ volis edziniĝi kun li. Li ankaŭ ricevis multajn invitojn viziti Gek-dojn, kiam li alveturos Eŭropon.

KORESPOND-SENSENCAĴO

Grava averto

Kelkaj Gek-doj povas konfuzi, senkonscie, la tutan labintkoran[1] movadon. Estonte nepre forrestu, precipe flanke de sovetiaj Gek-doj, sendi samajn leterojn (salutajn k. a.) al kelkaj adresoj en sama loko k distrikto. Tio ofte estas eĉ malhelpo por plivastigo de la labintkorado k krome povus ankaŭ nuligi la alcelatan efikon... Imagu, se al redakcio venas kelkaj tradukoj de sama letero, kiuj kompreneble pli malpli diferencas, kvankam ili estas tradukitaj el sama teksto...! Nepre atentu tiun averton, ĉar estas pli bone por nia movado, se foje letero venas al "malĝusta" adreso, do ne estos utiligita, ol se la tuta labintkorado fine malhavas fervorajn funkciigantojn. Devo estas de ĉiu SAT-ano, kiu ricevos peton por korespondperado, plenumi tiun peton, ĉar tiam la konfuza rimedo de kelkaj Gek-doj forrestas, nome ke ili provas atingi rezulton per multnombra dissendo de leteroj al samaj regionoj. Ne la kvanto, sed la kvalito decidos fine pri rezultoj de nia laboro...

715, Leipzig.

[1] Labintkor = Laborista internacia korespondado.

---

pezaj metaloj malhelpas al la korodo (detruo per kemiaj eksteraj influoj, ekz. per akvo k acidoj) de ili en la aero aŭ ĉe prilaboro.

Oni parolas pri la granda teknika estonto de berilio: laŭ amerikaj informoj berilio-malpezmetalaj aviadiloj estus firmaj k portivaj kiel ŝtalaj k tiel malpezaj kiel lignaj. Tamen ankoraŭ berilio estas preskaŭ same kosta kiel oro (1 kg. kostas 1—6 mk. g.). Jare oni dume kapablas produkti nur 1 milkilogramon.

Homo 2921.

NOTO. Ĉar ni ne ricevis ĝis finredakto de ĉi tiu n-o materialon por SPORTA aŭ VIRINA paĝoj, ni devis enmeti, kvankam ne estas ĝia vico, la SCIENC-KULTURAN paĝon. — *Red.*

PRI NOMOJ DE ADMINISTRA DIVIDO DE ŜTATOJ

Mi tute konsentas kun K-do Usov (n-o 265), ke tiaj nomoj devas esti fikse difinitaj por ĉiuj ŝtatoj. Ĝis nun ĝuste pro uzo de diversspecaj naciaj administraj nomoj ĥaoso regas en ĉi tiu fako, kiu povas tre malhelpi laboron de poŝtistoj k ege embarasi komencantajn esperantistojn. Mia propono estas kiel eble plej eviti enkondukon de novaj radikoj (similaj al *Okrug, oblastj*). La malnova vorto *Rusio* estos anstataŭita de la nova — *Sovetio* aŭ URSS (URSS estas pli rekomendinda ol la pli maloportuna k longsilaba USSR).

Por plia divido de la Unio tute sufiĉas jam ekzistantaj esp. vortoj. Jen estas ĝia ŝtuparo desupre malsupren:

1. Unio — aro da ĉiuj ŝtatoj (ruse — sojuz).

2. Lando (ruse: kraj) laŭ fundamenta signifo ne ĉiam koincidas kun ŝtato, ofte entenas kelkajn ŝtatojn (sibiria lando, Nord-kaŭkaza lando).

3. Aŭtonoma respubliko.

4. Aŭtonoma provinco (ruse: aŭtonoma oblastj) — malpligranda k malplirajta ol aŭt. respubliko.

Ĉiuj ŝtatoj dividiĝas en provincojn (oblastj) k distriktojn (okrug aŭ gubernio), subdistriktojn (selrajon, volostj, antaŭe ujezd) k vilaĝsovetojn (selsoveta teritorio).

Ĝiuj naciaj nomoj de administraj partoj de naciaj ŝtatoj (volosti, kanton, ajmak, ĥoŝun ktp.) estas tute superfluaj, ĉar facile anstataŭeblaj laŭ la senco per la vortoj distrikto, subdistrikto k vilaĝsoveto.

Mi opinias, ke por ĉiuj aliaj ŝtatoj oni povas same uzi anstataŭ naciaj nomoj (departemento, sanĝak, vilajet, kantono ktp.) nur klare esp. vortojn — provinco, distrikto, subdistrikto.

La vorto *distrikto* ofte uziĝas en profesia senco — distrikto de juĝisto, impostisto, poŝtoficejo ktp. (ruse: uĉastok). En ĉi tiu okazo oni devas uzi ĝin kun adjektiva klarigo kiel kunmetitan vorton: juĝejdistrikto, poŝtdistrikto, impostdistrikto, policdistrikto ktp. Mi utiligas la okazon por diri, ke sovetianoj plej ofte tute ne bezonas naciigi siajn adresojn: anstataŭ *Gogolevskaja, Krapotkinskaja, Leninskaja, Bazarnaja strato* estus pli oportune k simple por esp-istoj same kiel por poŝtistoj skribi — *Gogol-strato, Krapotkin-strato, Lenin-strato, Bazar-strato* ktp. Same por germanoj. Ĉu ne?

7-a horzono. *M. Krjukov.*

ATENTIGO DE LA REDAKCIO

Neuzatajn manuskriptojn ni ne resendas. Se resendo estas dezirata, oni avertu nin speciale k pagu la resendafrankon. Prefere tenu kopion de la manuskriptoj ĉe vi!

ĈE LA NEŬTRALULOJ

S-ino Marie Hankel, unu el la plej fruaj pioniroj de esp-o en Germanio, longtempe prezidantino de la Esp. Literatura Asocio (literatur-kontrola instanco), mortis en Dresden (je 15. 12.).

*

En marto 1929 okazis en Ŝanĥajo jarkunveno de Ŝanĥaja Esp. Asocio kun delegitoj el Nankin k aliaj ĉiniaj urboj. Pro memmortigo de l' sekretario la movado iom haltis. Estis pridiskutataj ĉ. 100 proponoj, ĉefe pri organizaj k propagandaj demandoj. Oni decidis peti financan subtenon de la Registaro k de Kuomintan.

*

En Hirŝberg (Silezio, Germ.) okazos de 21./22. junio 1930 fervojista esp. kongreso. Ankaŭ nefakuloj rajtas partopreni. Kotizo: 2 mk. g. Programo: Koncertvespero, ekskurso, po unu faka k nefaka kunsido. Informas: F. Thasler, Linkestr. 12, Hirŝberg (Riesengebirge).

*

La nova ministraro en Litovio promesis helpon por eldono de esp. gazeto. Du gravaj asocioj, unu por turismo, alia por reakiro de Vilno al Litovio, uzas prefere esp-on.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

DANIO. Odense. Loka lab. esp. grupo aranĝis 18. 12. literaturan vesperon dediĉitan al nia esp. proletverkisto E. Izgur. La kunvenon partoprenis reprezentantoj de kompartio, komjunularo, Ruĝa Helpo k prof-unuiĝo de la ŝoforoj. — *11 082. FINNLANDO. Tampere.* Kurso por komencantoj okazas en Tampere-a abstinenca domo. 15 p. Gvidas K-doj Lehtinen k Mäntinen, laŭ letera kurso de lab klerigasocio. Lab. esp. societo "Antaŭen" aranĝis propagandfeston kun ekspozicio la 27. 9. 1929. Ĉeestis ĉ. 200 p., al kiuj paroladis K-do Sahramäki (11 259). SAT-eldonaĵoj estis vendataj. Komenciĝis varbado inter sportuloj okaze de la Viena Olimpiado. Oni provas enkonduki esp. angulojn ĉe la lokaj lab. gazetoj. 22. 12. okazis nova familia festo de la societo. *(5095.)* — *FRANCIO. Elzaso.* Okaze de fondiĝo de naturamika grupo en Nancy pere de esp-istoj, regas nun granda intereso ĉe naturamikoj por esp-o. En nov. okazis naturamika renkontiĝo el Elzaso k Nancy kun 3 delegitoj el Germanio. Sola interpretisto K-do 4671 per esp-o. 15 K-doj mendis surloke lernolibrojn. Naturamika jun. gvidanto el Karlsruhe kunportis adreson el Jarlibro de sola tiea K-do k sukcesis aranĝi en tiu urbo kurson kun 30 p. 7. 1. 1930 okazis en Kolmar (Bas-Rhin) en naturamika grupo pri esp-a parolado. La varbadon prizorgas regiona estraro mem. Kurso kun proks. 25—30 p. Kurso ĉe naturamikoj en Freiburg (Germ.) en preparo. Komunuma administracio de la urbo Amnéville pagas lernolibrojn por esp. kursoj. Dum ĉi jaro naturamika asocio de Francio planas amasan naturamikan renkontiĝon. *(4671.)* — *GERMANIO.* Laŭ "Arbeiter-Esperantist" fondiĝis novaj LEA-grupoj en Bützow, Hindenburg, Hückelhoven, Oelsnitz, Penzig, Schwaan. — Novaj kursoj en Bielefeld (26 k 27 p.), Elberfeld (20 p.), Gleiwitz (36 p.), Hirŝberg (14 p.), Ŝmideberg (30 p.), Offenbaĥ (25, 24 k 15 p.), Valtershaŭzen (10 p.). — *Kursoj en LEA-distrikto Meklenburg.* — *Bona sukceso de rekta metodo.* Jam delonge kursoj okazis en Rostock. En 1929 ni decidis fari propagandon ankaŭ en ĉirkaŭaj urbetoj. Ni venigis tiucele Londonanon k faris publikajn paroladojn, sed ne tute sukcese, kvankam ni anoncis per gazetoj k grandaj afiŝoj. Tute hazarde ni trovis metodon pli sukcesan. En unu loko ni alparolis gvidanton de sindikato, kiu pro entuziasmo aranĝis kurson en sia urbo, kun garantio je minimumo el 15 kursanoj por kovri la kostojn. Laŭ sama metodo ankaŭ en aliaj lokoj ni akiris 103 kursanojn en 6 lokoj. El la kurskotizo de 8 mk. g. po partoprenanto la sindikatoj aŭ partioj konsentis pagi la duonon por siaj anoj. Por infanoj estis la sama aranĝo. Tiel la kotizo ne malhelpis organizatajn laboristojn k junulojn aliĝi. Ni aranĝis provizoran bilancon, pri vojaĝkosto, pagoj por lernĉambroj, por salajro, manĝ- k loĝejkostoj de la instruonto ktp. Ni enspezis la kalkulitan sumon, sed la elspezoj estis pli ol ni atendis pro la propagando, el kiu ni esperas bonajn fruktojn. Antaŭe ni en la subdistrikto Rostock nur havis unu grupon; estonte ni havos 4—6 grupojn. Pro tiu sukceso ni estas tre dankemaj al K-do Flower, London, kiu instruis laŭ rekta metodo. La kursoj daŭris dek semajnojn. Ni ne uzis legolibrojn ĝis la sesa leciono, kiam la kursanoj povis flue legi "Petron". Ni donis al ĉiu semajnan resumon de la pritraktita leciono multobligitan. Je la dua leciono ili jam kantis, je la kvara flue parolis inter si, k je la sesa ili skribis poŝtkarton al eksterlando k eklegis "Petron"; inter la oka ĝis deka ni faris elementan ekzamenon por kontroli la rezulton. La metodo tiom allogis la kursanojn per kantado, sinesprimo en la lingvo, ludoj ktp., ke ili restis ĝis la fino. Partoprenis ekzamenon ĝis nun 52 p. (restas neekzamenitaj 20 p.). La kursanoj dum la semajno ankoraŭfoje renkontiĝis k tralaboris la lecionon, kiun ili ricevis en la kurso. Tio

ankaŭ multe helpis al la sukceso de la kursoj. La leciono daŭras 1 ĝis 1½ horon. En tiu tempo oni legas du paĝojn de "Petro" k lernas proksimume 50 vortojn. En Rostock ni ne havis tian propagandsukceson, ĉar estas multe da aliaj allogoj, sed en malgrandaj urboj ni havis ĝis 20 kursanoj. Esp-o tre allogis tieajn socialistojn, ĉar ĝi eksterurbetigas, tutmondanigas ilin. Laŭ supra metodo K-do Flower de jan. daŭrigas sian laboron en alia parto de nia distrikto. — Distriktorganizanto (2530).

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Gazetoj

Brita Laboristo. Monata gazeto de la esp-istoj laboristaj en Britio. Respondeca redaktoro: L. Korinna. Adreso: 30, Wheatley Road, Halifax, Anglio. Abonpago por Britio ⅓ afrankite, por eksterl. egalvaloro (1,50 mk. g.). Aparta n-o 1 d. (0.15 mk. g.). N-o 1. Januaro 1930. 4 pĝ. Form. 19×25.

Jen signo de progreso en Britio! La tiea LEA eldonas sian propran monatan presorganon! Kun ĝojo ni salutas tiun kuraĝan paŝon de niaj K-doj, precipe nun, en la komenco de tiu jaro, kiu vidos SAT-kongreson en Londono. La enhavo estas ĉefe anglalingva. Bedaŭrinde la esperanta parto suferas pro preseraroj kaŭze de presista nesperto k ankaŭ pro lingvaj eraroj, kiujn la redaktanto devas klopodi eviti en estonto.

La Anarkiisto! 'Libera Federismo estu bazo de l' liberigo'. Redaktata de grupo de anarkistoj esp-istaj. Eld. de Zenkoku Rodokumiai Jijurengo kai, n-o 10, Kobikicho 2-chome, Kiobashi, *Tokio,* Japanio. N-o 1. Nov. 1929. 4 pĝ. Form. 15×23. Abonprezo ne montrita. La titolo de tiu gazeteto kun esp-a enhavo k klarigoj en japana lingvo montras sufiĉe klare ties celon.

N. Incertov, Kiel devas labori SEU-ĉelo. Eld. CK SEU, Moskvo, 1929. Form. 12×17 cm. 120 pĝ. Prezo: 0.60 rubl. (1.25 mk. g.).

Ruslingva gvidilo por esp. propagandistoj k grup-organizantoj en Sovetio.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Neue Zeitung, München; *Nordbay. Volkszeitung,* Nürnberg, 16. 12., Sektanoj antaŭ juĝejo (268); *L'Humanité,* Metz, 7. 12., Sektanoj antaŭ juĝ. (268); *Aurora,* Porto, jan., ĉe portug. universitatoj.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Kieva Pioniro, Kiev, 20. 12.; *Signalen,* Stokh., 2. 1.; *Münchener Post,* 19. 12., 27. 12.; *Der Republikaner,* Mulhouse, 22. 11.

Pri SAT-Kongreso raportis:

Der Volkslehrer, Langensalza, 22. 12.

Peresper. materialon enpresis:

Travail, Lyon, 28. 12.; *Neue Zeitg.,* München; *Nordbay. Volkszeitg.,* Nürnberg, 27. 12.

Korektoj. K-do 13 706 petas nin korekti en sia artikolo (n-o 274, fruntpĝ.): 2-a kolono, lin. 15 oni legu anst. franc-angla vortaro, *angla-franca;* sama kolono, 19-a linio: *Dume* (anst dum).

En n-o 275 legu pĝ. 169, 2-a kol., lin. 19 de supre, "mondon" (anst. modon), pĝ. 173, 2-a kol., lin. 24, "pomonate" (anst. pomante), pĝ. 178 en titoleto: "Ĝustigo" (anst. -i); la du piednotoj sur sama pĝ. devas esti interŝanĝitaj!

NIA POŜTO

10 088. — Ni ne povas enmeti vian polemikan artikolon. Kiam funkcios la Kom. Radio-Unuiĝo, ni volonte publikigos alvokon similan al tiu, kiun ni enmetis pri V. A. R. A. — *E. L.*

4671. — Loko mankas por la Kristnaska priskribo. Se temas pri renkontiĝo por nov. *1930,* ni akceptos en konciza formo.

15 262. — Via artikoleto transsendita al red. de "Scienc-Kult. Pĝ."

11 005. — Via rakonto taŭgas por "L. L.". Ni uzos okaze.

13 350. — Via manuskripto ricevita. Ni uzos siavice.

Uljanovsk-Zavolĵie. Ni dankas al vi pro bildskizoj. Ni ankoraŭ ne elektis. Kunhelpon ĉe estontaj laboroj similaj ni konsideros.

10 662. — Ŝercoj aperos certe. Leteroj de H. ne retrovitaj. Razjentraduko aperos, en okazo se spaco permesos.

KORESPONDADO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0.80 mk. g., ĉiu plia linio 0.50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo. Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

BRITIO

K-do Ernesto M. Hall, Poplar Ave, 4, *Oldham* (soc. urbkonsilanto), kĉl, pri ĉ. temoj, il. gaz., sporto, soc. kond.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Eric Stelzig, *Meistersdorf ap. Steinschönau,* PM k belaj PI, kĉl. Interesuloj skribu multnombre! Al ĉiu mi garantias resp.

FRANCIO

Adresŝanĝo. — K-do Rodolphe Stransky (antaŭe en Vauzelles) loĝas nun: 5 rue Gloxin, *Strasbourg.* — PI, bfl. k am. fotoj kĉl.

Adresŝanĝo. — K-do Favard René (SAT-ano 11 046) loĝas nun: 39 rue Jean Jacques Noirmant, *Tours* (I. et L.).

GERMANIO

K-dino Hanni Lessig, Elisenstr. 34, *Altenburg/Th.,* kore dankas al ĉ. respondintoj. Bedaŭrinde ne eblas al mi resp. al ĉ. 87.

K-do Gerhard Kuhler, Hauptstr. 88, *Weisswasser/O.-L.,* kĉl., pri ĉ. temoj, L, PI. Resp. al ĉiu.

Librobindistoj! — Kun vi mi dez. koresp., al aliaj mi ne resp., L, esp-aĵoj, kĉl. Adr.: Rudi Hofmann, Landsberger Str. 28/2, *Leipzig N 22.*

K-do William Bierbaum, Rudolfstr. 11, *Chemnitz,* kĉl., pri ĉ. temoj.

K-do Heinz Baba (13 053), Kemnitzerstr. 82, *Werder/Havel,* PI, bfl., PM, kĉl. Resp. garantiata.

K-do Felix Hartmann, Bertastr. 12, *Rheinhausen, N.-Rh.,* L, PI, kĉl., pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

HUNGARIO

K-dino I. Prassnig dankas al ĉ. Gek-doj k koresp-antoj. Pro senlaboriĝo ŝi ne povas al ĉ. respondi.

SOVETIO

K-do F. M. Lagutin, ul. Frunze 28, Pedteĥnikumo, *Novosibirsk,* Siberio, L, PK, PI, pri ĉ. temoj, kĉl. Skribu tuj!

— Gelernantoj (15—17 j.) de 10-jara lernejo k 3-jara metia lernejo koresp. kolektive k individue, gaz., fotoj, pri ĉ. temoj, kĉl. Adr.: *Ruza,* Mosk. okr., ŝkola 10-letka, Esperanta jaĉejka, Kuvaevu.

— Lernantoj de Esp. Seminario koresp. kĉl., L, PI, bfl. Resp. garant. Adr.: K-do Kopekin, Ŝevĉenkovskaja 59, *Dnepropetrovsk.*

— Internacia Esp. Brigado koresp. kĉl., pri politikaj k ekonomiaj temoj. Adr.: Walter Bräuer, Poltavskaja 15, K. D. K., *Dnepropetrovsk.*

— Grupo de gelaboristoj de Bramsa fabriko koresp. kĉl. gelab-istoj pri ĉ. temoj, kolektive k individue. Adr.: *Jaroslavl* p. o. Djadkovo, Tormaznoj zavod, J. N. Kartaŝovu.

Gek-doj Aleksandrino k Voldemaro Gorazeev (agronomo-pedagogo, geedzoj), *Urjupinsk,* Ĥoperskogo okr., Niĵne-Volĵskogo kraja, Bolŝaja ul. 27, kun Gek-doj ĉl., L, PK, PI, PM. Nepre resp.

K-do A. Pogorelov, Ĉerniŝevskaja 66, *Ĥarkov,* kun junularo k junul. organizoj ĉl.

K-do V. Kotelevcev, str. Bogdanovskij per. 14, *Ĥarkov-6,* interŝ. librojn k gazetojn (esp. lingvajn). Resp. gar.

— Lernantaro de 20-a Sovet-lernejo, *Barnaul,* "Koĵzavod 2", pri ĉ. temoj kun infanaro ĉl.

SOVETIO (daŭrigo)

— Kiu koresp. kun mi pri literaturo, foto k sporto? Adresu al: K-do V. Levĉik, Raboĉij gorodok 2, kv. 3, *Lugansk*, Ukrainio.

— Laborista rondeto de felfabriko, *Barnaul*, Zavkom pimzavoda 2, pri lab. k junularaj temoj kĉl.

K-do Johano Salo (oficisto), *Bobrovica*, Ukrainio, kĉl., pri ĉ. t.

K-do Fr. Vojtkeviĉ (16 j.), Kniŝovskaja ul. 24, *st. Min.-Vodi*, Terski okr., Kaŭkazio, kĉl., L, PK, PI, gaz. ilustr.

SVISIO

K-do Paŭlo Arbenz, Schillerstr. 7, *Töss-Winterthur*, PM, kĉl. Resp. gar.

Atentu! Kunhelpu!

1. februaro ĝis 1. majo okazos distriktaj k profunuiĝaj

FERVOJISTAJ KONGRESOJ

de Samaro-Zlatousta fervojo. *Tuj* sendu al la kongresoj *salutleterojn* de vialokaj proletaj organizoj, grupoj, priskribojn de ilia klasbatalo. Por organizi en ĉiu distr. centro ekspozicion, multnombre sendu *klasbatalajn afiŝojn, esp-aĵojn, fotojn, fervojist-aĵojn, ĉiun ekstersovetian ruslingvan gazeton ktp. Kunhelpu je finvenko de es-po ĉe la kongresoj.* Adresu: *USSR, Samara, Vokzal, Dorprofsoj.*

Pri nepra rekomenco respondecas la Fervoja Esperanto-Oficejo

Ĉe redakcio de ĉefa tagĵurnalo "LENINGRADA VERO" funkcias

LABKORA RONDETO

Ni koresp. kĉl, ŝanĝos gazet., fotojn. organizos kunligon de niaj fabr. kun alilandaj. Kunlaboru, skribu, organizu. Respondo estas garant Adr. Sovetio, Leningrad, 8. Upraznenij per., 17, kv. 34, al K do Tilin.

Bakistoj! Atentu!

Ĉu estas esp. amikoj, kiuj volas interrilati kun ni por interŝ. spertojn pri panbakejoj, teknike, konstruo de panfornoj, analizo de faruno k fermento, baki per vaporo. Ni estas panbakejo produktanta 2500 panojn po horo en unu el niaj fornoj. Skribu al: Frans Engels, De Keyzerlei 12, **Antverpeno**, Belg.

Esperanta rondeto ĉe klubo de sovetiaj kaj komercaj oficistoj deziras korespondi individue k kolektive kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

Adreso: *Rostov-Don*, Poŝtov jaŝĉik 82 por VSASOTR.

ADRESŜANĜO

K-do Jac. Braŭckmann k K-dino Lies van Trotsenburg loĝas de nun: Zilkerduinweg 22, *De Zilk ĉe Hillegom* (Nederlando). Bonvolu korekti en Jarlibro! — Ni same dez. koresp. pri edukado, junular-movado, sporto k seksedukado ktp.

ATENTU!

Esp.-rondeto ĉe Poŝtoficejo dez. koresp. kĉl, PI, PM, gaz. Adr.: La Stelogek-doj, Poŝtkesto, 789, Stockholm, I. (Svedio).

★ 10 Gek-doj komencantoj ★ kiuj forlasas la kurson, dez. koresp. kun eksterlandaj Gek-doj. Resp. garantiata. Adr.: A. Erler, *Meissen*/Sa., Hirschbergstr. 11, II, Germanio.

ENHAVO:

	pago
Impresoj el Meksikio	189—190
Pri la disdivido de grundo en Latvio	190
Alia kandidato por la Ligo de Nacioj	190—191
El usona taglibro	191
Kiam mi estis en malliberejo	191—192
El siriusa vidpunkto	192
Vaganta junulo en Argentino	192—193
Por proleta sano	193
La intelekta libero estas nepre necesa	193—194
Filozofi-politika edukado	194
En kunesto kun grandaj spiritoj	194
Esperanto-Servo	195
Sennaciula Scienc-Kultura Paĝo	196—197
Tra Esperantio	197—199
Korespondado, Anoncoj	199—200

Je la 15-an de februaro la kursanoj de "Fervore antaŭen" en Magdeburg aranĝos

POŜTKARTVESPERON !

por montri la valoron de esp-o por la translima interfratiĝo k por kolekti varb- k ekspoziciaĵojn. La legantoj estas petataj sendi salutkartojn. Ni respondos. Adresu al: Fritz Forster, Kl. Weinhofstr. 10/11, *Magdeburg*, Germanio. —

Ateista Unio de urbo Klin decidis starigi firman konstantan interligon kun ĉiulandaj ateistoj. Do sendu multnombrajn leterojn laŭ adreso: Rajsovet S. V. B., Leninskaja 8, *Klin*, Mosk. okr., Sovetio.

VJATKA SAT-RONDO

aranĝas en la fino de januaro Internacian Letervesperon pri la temo: "Ekonomia kaj kultur-politika vivo de eksterlandaj laboristoj". Sendu grandamase konformajn leterojn kaj ilustraĵojn. Respondo garantiata.

Adreso: USSR, *Vjatka*, ul. Komuni 33, Krasnij ugolok prosveŝĉenca.

Lernantoj el 2 lernejoj deziregas serioze k daŭre koresp., interŝanĝi fotojn, desegnojn, model Nepra k senprokrasta resp. Adreso:

I. *st. Perovo M. K. ĵ. d, 9-jaro fervojista lernejo, esperanta rondeto;*

II. *Moskvo, Givcev-Vraĵek, 25 21-lernejo Ĥono, esperanta rondeto.*

Gejunuloj kaj Gelaboristoj!

Baldaŭ estos aranĝata granda ekspozicio de nia laborista k lernanta interkorespondado. Bonvolu sendi multegajn leterojn, poŝtkartojn ilustritajn, fotografaĵojn k aliajn ekspozaĵojn por disvastigi la Ekspozicion. Al ĉiu sendonto ni respondos senprokraste. Adresu: Leningrad, Petrogr. St., Pr. K. Libknecht, 59, 191 ŝkola.

LEA-grupo en Mannheim

aranĝos je la 22-a de marto, okaze de distriktkonferenco,

publikan varbfeston.

Ĉiuj eksterlandaj Gek-doj, kiuj harzarde tramigros Sudgermanion, estas petataj nepre veni al tiu tago. Pri flegado k tranoktejo estos zorgate. Krome ni invitas oratoron esperantan el la najbara Francio veni, kontraŭ malgranda kompenco. Sendu salutlet. *Laborista Esperanto-Asocio, Grupo Mannheim*. G 5, 3 (Germanio).



La studentoj de la Ukrainia komunista Universitato je nomo de Artem
Kom-Universitet, Artemstr. Ĥarkov

per la esperanto-rondeto deziras korespondi kĉl laboristaj organizoj, komunistoj, komunistaj kaj marksistaj kursoj, lernejoj, redakcioj de komgazetoj, komunistaj kluboj k. s.

Korespondu! Korespondigu!

Ni interŝanĝos leterojn, gazetojn, fotojn, ilustr. revuojn ktp.

K-dino Mario Stepanova

(flegistino) dez. koresp. kun Gek-doj ĉ. l., pri ĉ. temoj. Interes. pri laboristmovado ĉ. l. (dez. seriozan koresp. (precipe kun Japanio, Germ., Britio). Adr.: *Taganrog*, B. Berĵevoj per 14. (Sovetio).

GRANDA EKSPOZICIO de internacia laborista korespondado k gazetaro jam ekzistas.

GEKAMARADOJ! Skribu multajn leterojn, poŝtkartojn ilustritajn kaj sendu viajn fotografaĵojn por plenplenigi la ekspozicion. Respondo estas nepre garantiata. Ĉion adresu: USSR, *Leningrad*, Viborg. St., Lomanskij per., 15, DOMO de KULTURO al Esperanto Sekcio.

Abontarifo al Sennaciulo: (La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon.) **Argentino, pes. 5 (6); Aŭstrio, ŝil. 10 (12); Belgio, belgoj 10 (12); Brazilio, milrejs. 15 (18); Britio, ŝil. 8 (9); Bulgario, lev. 200 (250); Ĉeĥoslovakio, kr. 50 (60); Danio, kr. 8 (10); Estonio, kr. 7 (8); Finnlando, mk. 70 (80); Francio, fr. 35 (40); Germanio, mk. 8 (9); Hispanio, pes. 10 (12); Hungario, peng. 8 (10); Italio, lir. 40 (45); Japanio, jen. 4 (5); Jugoslavio, din. 100 (120); Latvio, lat. 8 (10); Litovio, lid. 15 (20); Nederlando, guld. 5 (6); Norvegio, kr. 8 (9); Polio, zlot. 12 (15); Portugalio, esk. 35 (40); Rumanio, lej. 300 (350); Sovetio, rubl. 4 (4,50); Svedio, kr. 8 (9); Svisio, fr. 10 (12); Usono, dol. 2 (2,50). — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis. MONON ONI SENDU:** rekte al la Administranto de SAT, **Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio),** poŝtĉek-konto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227 848 — s'Gravenhage, 142 084 — Praha, 501 007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191 335 — Wien-D, 137 725 — Zagreb, 40 040 — Kobenhavn, 14 938 — Zürich-VIII, 15 929 — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX, per la poŝtkonto 1234—22. — La sovetianoj al CK de SEU, poŝtkesto n-o 630, Moskvo. En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per **ŝtataj monbiletoj en registrita letero.**

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)